

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Nova Estraro



**Intervjuoj: La
prezidantoj de
UEA kaj SAT**



**Unua Strategia
Forumo**



**Kongresa
Kalejdoskopo**



Festa fiero en Montpeliero

Vi trovos...

145 Malferme

**Montpeliero
mesaĝas
malfermon**

István Ertl



Francjo Veuthey

146 Inaŭguro

La mondpokalo de amikeco

148 Komitato

Afrikanano unuafoje en la Estraro

Osmo Buller

150 Intervjuo kun Kep Enderby

Esperanto: per si mem politika

Intervjuo kun Yves Peyraut

Sen polemikoj

152 Kongresa temo

**La ponto kaj
la kolonoj**

Jesuo de las Heras

Sola, sed trafa

Fabienne Berthelot



Clay Magalhães

153 Internacia Kongresa Universitato

De bakterioj al eksterteranoj

István Ertl

154 KONGRESA KALEJDOSKOPO

156 Teatro

Ĉu du estas tro?

Paul Gubbins

Mirinda rekviemo

Miko Sloper



Katharina Eckhardt

157 Muziko

Velado sur muzikaj ondoj

Belkanto el la fingroj

Zdravka Bojčeva

Ĉantoj de maskulo

Miko Sloper

Pluvo dancigas subŝirme

158 Forumo de la E-movado

Pretaj kunlabori neburokrate

Renato Corsetti

**Ĉu asocio, movado,
komunumo,
civito?**

Humphrey Tonkin



Francjo Veuthey

159 KONGRESA REZOLUCIO

160 Solena fermo

Ni eliris el la cirklo

István Ertl

161 Kulturo

**Auld baldaŭ
kandidato por
Nobel-premio**

La kovrilo: Dancado
en la kongresa halo.
(Foto: F. Veuthey)

Malferme:

Kongresanoj sub-
skribas gigantan
UK-bildkarton, kiu
aperu en la rekord-
libro Guinness.
(Foto: F. Veuthey)

162 KONGRESA KERMESO

164 NEKROLOGOJ

OFICIALA INFORMILO

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establitita kiel organo
de UEA en 1908 de Hector Hodler
(1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.

Grafiko: Francisco L. Veuthey.

Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotino: la 10-a de ĉiu monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66;
USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informi-
ĝi ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p.

1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190.

Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera

kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja

ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus

749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro

25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-

konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:

Adreso de la Centra Oficejo de UEA:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ

Rotterdam, Nederlando.

Telefona: +31-10-436-1044.

Telefaksa: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.



MONTPELIERO MESAĜAS MALFERMON

“La sola okazo en la tuta jaro kiam la malmultiĝanta esperantistaro povas praktiki sian lingvon” — pli-malpli tiel “raportis” pri la 83-a Universala Kongreso (Montpeliero, 1-8 aŭg. 1998) la prestiĝa gazeto *Le Monde*, kies korespondanto eĉ ne faris viziteton al la UK. Alie ĉi tiu ĵurnalisto povus ekscii de kiu ajn el la 3133 aliĝintoj el 66 landoj ke tutmonde kaj tutjare ekzistas enorme pli da praktikejoj de Esperanto ol bagateligantoj povus pensi.

Sed, sendube, la UK restas la plej impona kaj plej multifaceta Esperanto-aranĝo de la jaro, kaj tiu karakterizo aparte validis por la Montpeliera UK. Nome, ĝi estis la plej vizitata mondkongreso de post la Jubilea Jaro (1987). Alie dirite, en la historio de la ĝisnunaj UK-oj ĝi okupis la dekan lokon laŭ grandeco, kaj en Okcidenta Eŭropo (se tia difino havas sencon post 1989) ĝi estis la plej vizitata Universala Kongreso iam ajn, kun escepto de la 15-a en Nurenbergo (1923).

La kongreso havis tiom da facetoj ke kelkajn el ili ni eĉ ne sukcesis eltagi por ĉi tiu numero. Vi devos atendi oktobron por legi, ekzemple, pri Belartaj Konkursoj, pri la lingvopolitika kaj interkultura kolokvo, la interlingvistika seminario, aŭ intervjuojn kun la nova prezidanto de la Akademio kaj kun brita membro de la Eŭropa parlamento. (La samo koncernas ĉiujn raportojn pri someraj Esperanto-aranĝoj.)

Laŭ bone pripensita koncepto, nemalmultaj eroj de la UK estis malfermaj por la ekstera publiko. (Kaj ĉi tiuj programeroj estintus eĉ pli grandnombraj se la vetero ne intervenus per kaprica pluvemo.) Via redaktoro ofte aŭdis diversnaciajn kongresanojn laŭdinde elturniĝi en la franca lingvo, por respondi al demandoj de interesitaj lokanoj. Kaj foje, kiam li alparolis en la urbo junulinon kun libro de esperantisto en la manoj, ŝi montriĝis nekongresano.

Rilate la amas-informilojn, la sinteno de *Le Monde* ne estis tipa, ĉar aliaj, ekz. la regiona ĵurnalo *Midi Libre*, trafe kaj ripete pozitivis pri nia kongreso. Intervjuataj esperantistoj estis ofta vidaĵo en nia kunven-palaco Le Corum, kie regule cirkulis televidaj staboj.

Malferma spirito estis la precipa mesaĝo de la Montpeliera UK, kiu invitis ekstermovadajn fakulojn al sia eduka kolokvo, aŭspiciata de Unesko. Sed malfermo, malfermiteco estis ĝiaj ŝlosilaj vortoj ankaŭ rilate al Esperantujo. Ja Montpeliero lanĉis la unuan Strategian Forumon de la Esperanto-movado, kiu — kvankam en si mem reciproke riĉiga evento — trovos sian plenan sencon nur se ĝi montriĝos komenca punkto por longa, solida kunlaboro inter la diversaj establoj.

István Ertl

Lee ankaŭ memorigis ke Francio estas la lando de la unua Universala Kongreso (1905, Bulo-njo-sur-Maró), kie tamen ne okazis UK jam de 41 jaroj (laste en Marsejlo, 1957).

LEE Chong-Yeong fakte ŝajnis kaptani futbal-teamon, ĉar sur la podio sidis ĝuste dekunu-opo: la kompleta Estraro de UEA (krom la forestanta Mark Fettes); ĝenerala direktoro Osmo Buller; vic-urbestro s-ino Zanetachi; Barbara Despiney, rektoro de Internacia Kongresa Universitato; Claude Nourmont, prezidantino de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) kaj de LKK; kaj Renato Corsetti, reĝisoro de la kongresa temo.

Multaj eminentuloj francaj sendis salutmesaĝon aŭ senkulpigon pri sia neĉeesto, i.a. la estroj de la du parlamentaj ĉambroj, kvin ministroj, akademiarektoro, la prefekto de la regiono, la episkopo de Montpeliero, tri lokaj deputitoj kaj verkisto Claude Michelet. El la membroj de la Honora Komitato, skribis salutis lingvistoj André Martinet kaj Henriette Walter, sciencistoj Antoine Danchin, Albert Jacquard kaj Théodore Monod. La Alta Protektanto Marie-George Buffet (ministrio pri junularo kaj sporto) "esprimis ĉiujn siajn kuraĝigojn al la partoprenantoj kaj organizantoj de tiuj tagoj, kiuj tute certe havos realan sukceson". Letere salutis la ambasadoroj de Britio, Hispanio, Hungario, Litovio, Malto, Nederlando kaj Portugalio.

La mondpokalo de

En sia bonveniga saluto prezidanto LEE Chong-Yeong ne evitis komplimentan aludon al piedpilko, la sporto kies mondĉampionadon ĵus gajnis la lando gastiganta nian kongreson.

Brazile impeta saluto al la kongresanoj: Evaldo Pauli. Tri aliaj kontinentoj salutas sube.



Gaston Houssou (Benino)



Tõnu Hirsik (Estonio)



Nome de la Ĝenerala Direktoro de Unesko mi ĝojas kore saluti la partoprenantojn de la 83-a Universala Kongreso de Esperanto.

Unesko aparte aprezas la ĉi-jaran kongresan temon, "Mediteraneo — ponto inter kulturoj", kiu kondukas al pli bona interkompreniĝo kaj solidareco inter la homoj per kompreno de fremdaj kulturoj kaj lingvoj. Mi krome notas kun granda kontento ke kadre de la kongreso oni okazigos specialan seminarion "Lingvo-politiko kaj interkultura edukado: kion alportas Esperanto?", temo kiu rekte rilatas al la aktivaj de nia nove fondita Sektoro pri Lingvoj kaj ties LINGUAPAX-projekto, kiu — kiel vi scias — celas antaŭenigi lingvan diversecon kaj plurlingvan edukadon.

La kongreso aparte atentigas la 50-jariĝon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Edukado al civitaneco, kaj lingvaj kaj kulturaj rajtoj, kiel parto de la homaj rajtoj, iĝas pli kaj pli esencaj en la lukto por paco. La festado de la 50

jariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj estas unu el la prioritataj agadoj de Unesko kadre de ties programo por packulturo.

Estas klare ke la rezultoj de la kongreso pliriĝigos la laboron de Unesko en multaj kampoj, precipe la preparadon de raporto de Unesko pri la lingvoj de la mondo, kiu aperos en 2001. Ĝi estos aktualigita ĉiun kvinan jaron kaj donos al membroŝtatoj taŭgajn rekomendojn en la lingva kampo. La preparado de la raporto jam komenciĝis en proksima kunlaboro kun pluraj neregistraj organizaĵoj, kaj ni esperas ke ankaŭ UEA partoprenos. Fakte, la sperto pruvas ke nia longdaŭra kunlaboro estas profitiga por ni ambaŭ, kaj ke multaj el niaj ĝeneralaj celoj kaj ideoj similas.

Dezirante al vi agrablan restadon en Montpeliero, mi certigas vin pri la aprezo de Unesko al la grava laboro kiun vi disvolvas por krei mondon en iu diverseco kunsonos kun pli granda unueco.

Colin Power, Asista Ĝenerala Direktoro pri Edukado



Ĉiuj rajtoj: François Vauthier

Rajtoj; datreveno menciita ankaŭ en la mesaĝo de Unesko, kiun voĉigis Barbara Despiney. Boutros Boutros-Ghali, Ĝenerala Sekretario de la Internacia Organizaĵo de Francilingvaj Landoj, omaĝis al la batalo de UEA “sub la signo de amikeco kaj solidareco inter la popoloj”. Bondezirojn sendis Denis Cunningham, prezidanto de Federacio Internacia de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj. La jam tradician saluton de d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof laŭtlegis Povilas Jegorovas. Fine, Hugo Röllinger, la aŭtoro de *Monumente pri Esperanto* raportis (voĉe de Buller) pri sia daŭra kolekto de Zamenhof/Esperanto-Objektoj: nombrinte ĝis la UK 1099 ZEO-jn, li instigis la kongresanojn “tuj [provi] akiri de sia urbestro iun publikan objekton, nomotan laŭ Zamenhof aŭ Esperanto”, por “adiaŭi tiun kuriozan nombron de ZEO-j”. (Fakte, jam semajnon antaŭ la UK la 1100-a ZEO estis inaŭgurita: vd. p. 163).

Malofte sonas saksofono dum inaŭguro: ni tamen aŭdis ĝin en la muzika paŭzo, zorge de Isabelle François kaj Alexandre Auger el la okcidenta grupo Mescladissa.

Sudo kaj Nordo

Renato Corsetti donis koncizan enkondukon al la kongresa temo “Mediterraneo — ponto inter kulturoj”. Li emfazis ke, dum la Esperantomovado longan tempon servis — kaj ĝi plu servu — kiel ponto inter la politikaj Oriento kaj Okcidento, ĝiaj strukturoj kaj ĝia memkonscio ankoraŭ ne same taŭgas por alfronti la problemojn de Sudo kaj Nordo — des malpli ke en la plejparto de la afrikaj kaj islamaj landoj mankas organizita Esperanto-movado.

Michela Lipari prezentis la ses novajn Honorajn Membrojn de UEA: André Albault kaj Pierre Babin (Francio), Ignat Bociort (Rumanio), Claude Piron (Svislando), William R. Harmon (Usono) kaj Saburō Yamazoe (Japanio). (Iliaj biografietoj aperos en la oktobra numero.)

LEE Chong-Yeong memorigis en parolado ke ĉi tiu UK donas okazon festi triopan jubilearon: en 1998 UFE estas 100-jara, UEA 90-jara, kaj la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj 50-

Estas por mi granda plezuro

sendi bondezirojn al la membroj de Universala Esperanto-Asocio en la momento kiam vi kunvenas en Montpeliero por via 83-a kongreso.

Gesinjoroj, la nuna estas jubilea jaro. En tiu ĉi jaro de la kvindekjariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, ĉie en la mondo viroj kaj virinoj de ĉiuj haŭtkoloroj kaj de ĉiuj religioj kuniĝas por proprii al si niajn komunajn homajn rajtojn. Ili tion faras sciante ke la homaj rajtoj estas universalaj kaj nedisigeblaj, kaj ke la lingvo de la homaj rajtoj estas komuna lingvo de ĉiuj popoloj. Ĝi estas verdire universala lingvo, kiu fremdas al neniu kulturo kaj propras al ĉiuj nacioj. Ĝi estas lingvo kiu asertas la rajton je evoluo, je vivo kaj libereco, je malsamaj opinioj kaj diverseco. Ĝi estas en la kerno de ĉio kion Unuiĝintaj Nacioj aspiras atingi en paco kaj evoluemo.

Kiam vi kunvenas en Montpeliero por esplori la pontojn inter kulturoj, vi emfazos, mi scias, ke toleremo estas konstruelemento de ĉiuj pontoj, la bazo de ĉiuj homaj rajtoj, ĉiaj paco kaj progreso, ke lingvon oni devas uzi por superi diferencojn, kaj ke konstrua komunikado kreas pontojn, dum lingvo uzata kiel armilo nur apartigas.

Mi dankas al Universala Esperanto-Asocio pro ĝia laboro por antaŭenigi lingvon kiel ilon por unuigi anstataŭ disigi kaj pro via celebrado de la kvindekjariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Tiu ĉi konferenco povos valore kontribui al tiu procezo, per fortigo de ligoj kaj interŝanĝoj de informoj kaj ideoj.

Mi deziras al vi agrablan kaj profitodonan semajnon en Montpeliero.

Kofi A. Annan,
Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj

jariĝas. Li dankis ĉiujn kiuj pozitive reagis al Kampanjo 2000 kaj emfazis sian konvinkon ke Esperanto estos la lingvo de la 21-a jarcento: epoko kiu komenciĝos post malmultaj monatoj!

Nome de SAT salutis Yves Peyraut, prezidanto de ties Plenumkomitato (vd. sur p. 158), antaŭvidante “novan etapon por kune antaŭeniri”.

Ĉirkaŭ duonan horon daŭris la lasta programero: salutoj el preskaŭ ĉiuj 66 landoj reprezentataj en ĉi tiu Universala Kongreso. Dum ĝi klariĝis ke salutmesaĝon sendis ankaŭ la aŭstra kanceliero Viktor Klima, kies lando prezidas Eŭropan Union en la dua duono de 1998.

Kaj, por ke la inaŭguro estu ne nur riĉenhava sed ankaŭ vere solena, plurmil-voĉe eksonis nia himno, “La espero”.

István Ertl

Ester Saban (Israelo)



Ĉeestis en la publiko elstaruloj de la loka politiko, i.a. François Liberti, deputito, estro de la proksima urbo Sète, kiu regule gastigas Internacian Semajnon E-istan.

Nome de la urbo bonvenigis la kongresanojn vic-urbeŝtrino Zanetachi, kiu emfazis ke Montpeliero estas ekde la mezepoko urbo de kulturaj interŝanĝoj, kie integriĝas diversaj valoroj. Sekvis voĉlegado de salutoj: Fred de Geus legis vortojn de Kofi Annan, Ĝenerala Sekretario de UN, kiu i.a. dankis ke UEA celebras la 50-jariĝon de la Universala Deklaracio de Homaj

En Montpeliero ekoficis nova Komitato de UEA, kies mandato daŭros ĝis julio 2001. En la unua kunsido, sabate, ĝi konsistis el 53 komitatanoj A, reprezentantaj la aliĝintajn landajn kaj fakajn asociojn kaj TEJO-n, kaj el 8 komitatanoj B, elektitaj de la individuaj membroj (vd. ĉi-sube). Krome, 9 landaj asocioj kun malpli ol 100 membroj delegis po unu ne-voĉdonrajtan observanton.

En tri diversaj okazoj la A- kaj B-membroj alektis komitatanojn C, entute 13, "por certigi al la Asocio la kunlaboron de spertuloj", kiel difinas la Statuto. Post ricevo de pliaj rajtigiloj la nombro de la A-komitatanoj kreskis al 57, tiel ke fine la Komitato havis 78 plenrajtajn membrojn. El ili 58 ĉeestis mem aŭ, en kazo de kelkaj A-komitatanoj, estis reprezentataj de anstataŭanto. (Plena listo de la Komitato aperos en la oktobra numero.)

Post trijara paŭzo sen landa asocio de UEA en Slovakio, la Komitato akceptis aliĝon de Slovaka Esperanta Federacio. Tiel la nombro de aliĝintaj landaj asocioj kreskis al 60. Du asocioj, Esperantista Internacia Centro de la Civitanoj de la Mondo kaj Internacia Komunista Esperantista Kolektivo, ricevis la statuson de kunlaboranta faka asocio. La nombro de ĉi tiuj nun estas 38.

KOMITATO

Afrikanu unuafoje en la Estraro



De ok al sep, de sep al ses: dum la elekto mem modifiĝis la celata membro-nombro de la nova Estraro.

La anoj de la nova Estraro. De maldekstre: Petro Chrdle, Michela Lipari, Kep Enderby, Renato Corsetti. Sur la foto dekstre: la du forestintoj.

La plej atendata decido kompreneble estis la elekto de nova Estraro. Plimulto de la antaŭaj estraranoj, i.a. prezidanto LEE Chong-Yeong, anoncis jam plurajn monatojn pli frue ke ili ne estos disponeblaj por nova trijara

periodo. Estis do certe ke la Estraro grandparte renoviĝos. Malgraŭ diligenta preparlaboro de la Elekta Komisiono, la elektado estis pena procezo, kiu postulis multe pli da tempo ol antaŭvidite. La fina konsisto de la Estraro plene certigis nur en la lasta komitatkunsido en ĵaŭdo.

Rezulto de la elekto de Komitatanoj B

En dimanĉo, la 19-an de julio, la komisiono nomita de la Estraro kaj la direktoroj de UEA nombris la voĉojn donitajn en la elektado de Komitatanoj B por la periodo 1998-2001. En la nombrado asistis krome tri individuaj membroj, invititaj de la ĝenerala direktoro.

La partopreno estis rekorda: entute 2328 individuaj membroj resendis la balotilon. Tio estas 33,64% el la dissenditaj 6920 balotiloj. Estis 2314 validaj kaj 14 nevalidaj balotiloj.

La kandidatoj ricevis voĉojn jene (laŭ la ordo de nombro):

LEE Chong-Yeong 1436
Atilio Orellana Rojas 1384*
Amri Wandel 1384*
Michela Lipari 1357*
Andrzej Pettyn 1357*
YAMASAKI Seikō 1181
Katinjo Fetes-Tosegi 1133
Aleksander Korjenkov 1129

Augusto Casquero de la Cruz 1074
Petro Chrdle 1041
Wu Guojiang 1039
Jorge A. Leoni de León 867
Christian Darbellay 850
Alicja Lewanderska-Quednau 783
Potturu V. Ranganayakulu 757

Elektitaj kiel Komitatanoj B por la periodo 1998-2001 estas: LEE Chong-Yeong, Atilio Orellana Rojas, Amri Wandel, Michela Lipari, Andrzej Pettyn, YAMASAKI Seikō, Katinjo Fetes-Tosegi kaj Aleksander Korjenkov.

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro

La nova Estraro

Kiel nova prezidanto estis elektita Kep Enderby, aŭstralia juristo kaj eksministro (vd. intervjuon sur p. 158). Li respondecos i.a. pri la eksteraj rilatoj de UEA. Kiel vicprezidanto ekfunkcias Renato Corsetti el Italio, taskita pri Kampanjo 2000, landa agado kaj financoj. Lia samlandanino, ĝenerala sekretario Michela Lipari, estas la sola kiu membris ankaŭ en la antaŭa Estraro. La aliaj estraranoj: Petro Chrdle el Ĉeĥio (faka kaj scienco agado, edukado), Kalle Kniivilä el Svedio (informado) kaj GBEGLO Koffi el Togolando (agado en Afriko). La elekto de Gbeglo estas historia, ĉar unuafoje afrika esperantisto okupas lokon en la registaro de la monda esperantistaro. Kvankam Lipari estas la sola reelektito, krom ŝi ankaŭ Corsetti havas jam sperton pri Estrara laboro, ĉar li membris jam en la du kabinetoj de Maertens (1980-86).

*Orellana Rojas kaj Wandel, resp. Lipari kaj Pettyn efektive ricevis same multe da voĉoj.



GBEGLO Koffi

Komplezo de GREGO Koffi



Kalle Kniivilä

Komplezo de Kalle Kniivilä

helpa, pro tro rigidaj reguloj. Nature do la Komitato poste decidis ke ĝi estu tuj reviziita.

Pro malkontento pri la proceduro kaj pri aperintaj personaj kontraŭeoj Fred de Geus anoncis tuj sian cedon pri estraraneco kaj C-komitataneco. Rezulte la Estraro fariĝis nur 6-kapa. Fakte, jam en iu pli frua momento de tiu dorna procezo la Elekta Komisiono proponis 6-membran Estraron. Tio okazis kiam fariĝis evidente ke Lipari kaj Wandel ne povus esti kune reelektitaj pro la rezisto de la unua. Sekve la Komisiono proponis ellasi ilin ambaŭ kaj reelekti nur De Geus, kiu tamen rifuzis eniri la Estraron se li estus en ĝi sola reelektito el la antaŭa Estraro.

Oni elektis ankaŭ Komisionon pri Financo, kiun konsistigas nun Marcel Delforge, Flory Witdoeck (ambaŭ el Belgio), Hans ten Hagen kaj Bob Venhuizen (ambaŭ el Nederlando). Kiel la komitataj reviziantoj estis elektitaj Grégoire Maertens (Belgio) kaj Loes Demmendaal (Nederlando).

La Komitato krome akceptis la raporton de la malnova Estraro pri la agado en 1997 (jun., p. 107-115). Ĉe ĉiu ĉapitro la diskutantoj laŭdis la ĝeneralan kreskon de aktiveco en la Asocio. La laŭdoj kulminis en forta aplaŭdo al prof. Lee kaj lia teamo, kiuj motoris tiun revigligon.

Sur forta financa bazo

Ankaŭ la financajn raportojn pri 1997 kaj la buĝeton por 1999 oni traktis kun granda kontento. Dank' al konsekvenca agado en la pasintaj jaroj, la financa bazo de UEA nun estas pli forta ol iam antaŭe. Sekve, kun la beno de la Komitato, baldaŭ realigeblos la longe sopirata plifortigo de la stabo en la CO per dungo de plia

La Elekta Komisiono origine antaŭvidis 8-kapan Estraron, en kiu sidus ankaŭ la antaŭaj estraranoj Amri Wandel kaj Fred de Geus. En la Komitato tamen venkis la opinio ke la Estraro prefere estu malpli granda, nome 7-membra, kion oni trovis pli efika kaj malpli peza rilate kostojn. Post tiu decido oni elektis Estraron sen Wandel. Por tiu propono voĉdonis 34 kaj kontraŭ ĝi 11 komitatanoj. La diskutoj estis tre emociaj kaj la argumentoj ofte malfacile sekveblaj. Vere ne enviinda estis la tasko de la elekto-komisionanoj, sed certe ankaŭ tiu de malpli incitaj komitatanoj. La pasintjare akceptita Elekta Regularo, kies celo ĝuste estis certigi glatan proceduron, montriĝis pli malhelpa ol

Ne nur la legendo de la babilona lingvokonfuzo instruis al la homoj ke la plej grava komunikilo *Lingvo* povas disigi, sed ankaŭ kunligi. Estas homara revo venki lingvobarierojn kaj esti komprenata kaj akceptata de ĉiuj.

Pro tio oni serĉis en ĉiuj tempoj lingvojn kiuj estu lerneblaj kaj uzeblaj de ĉiuj. Bedaŭrinde tio restis ĝis hodiaŭ revo, kvankam ĝuste per la planlingvo Esperanto oni sukcesis evoluigi mondampleksan kaj vivantan lingvomodelon, kiu ja faris rimarkindajn progresojn.

Vi prenis por via kongreso la devizon "Mediterraneo — ponto inter kulturoj". Esperanto estas infano de la mediteraneaj lingvoj, ĝi prenis mult-

nombrajn vortradikojn el la latina kaj estas ankaŭ sone parenca kun la mediteraneaj lingvoj. Kvankam arte konstruita sur desegnotabulo, Esperanto montras fortan vivovolon kiel parolata lingvo. Antaŭ ĉio la radiofonio fariĝis nemalhavebla ilo por la disvastigado de Esperanto.

Esperanto kontribuas al la alproksimiĝo de homoj kaj kulturoj. Pro tio mi opinias ke ankaŭ ĉi tiu lingvo gajnos signifon en la proceso de la elformiĝo de universala socio.

Estu la konsultigoj de via kongreso kontribuo por tio.

Viktor Klima, Federacia Kanceliero de Aŭstrio

Estas por mi granda plezuro

povi saluti vin okaze de la 83-a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio. Tio havas plurajn kialojn. La unua estas ke la temo pri kiu vi elektis okupiĝi dum la tuta semajno — *Mediterraneo — ponto inter kulturoj* — estas por mi temo kara el pluraj vidpunktoj:

El persona vidpunkto, evidente, sed ankaŭ kiel respondeculo dum multaj jaroj de la egipta diplomataro. Diversfoje mi havis la okazon renkontiĝi kun mediteraneaj demandoj ankaŭ dum miaj kvin jaroj ĉe la kapo de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj.

Ankoraŭ nun, kiam mi plenumas novan funkcion kiel Ĝenerala Sekretario de la Internacia Organizaĵo de Franclingvaj Landoj, la mediteranea areo estas denove en la kerno de miaj okupiĝoj. Tio montras kiom gravas por mi la diskutoj kiujn vi havos dum ĉi tiu grava aranĝo.

Cetere, mi nepre intencis omaĝi al la batalo kiun daŭrigas via Asocio jam de 90 jaroj: batalo sub la signo de amikeco kaj solidareco inter la popoloj, sub la signo de respekto al kultura diverseco.

En momento kiam tutmondiĝas la interŝanĝoj, kiam konturiĝas minaco de lingva monotonigo kaj de kultura ŝrumpigo, ni ja devas mobilizi nin, por ke la monda komunumo, al kiu celas la leĝoj de la merkato, ne generu unu tutmondan kulturon kun unuecaj modeloj, kondutoj kaj pensado. De tio dependas la demokratigo, je monda nivelo, de la rilatoj interpopolaj!

Je la fino mi volas diri al vi ke en la vorto "Esperanto" mem troviĝas komuna espero: espero pri solidareco kaj toleremo, pri komprenemo kaj respekto al aliujoj. Troviĝas en ĝi ankaŭ certeco — pri la komuneco de nia destino kaj pri nia aparteno al unusola homa komunumo.

Tiujn valorojn mi dividas kun vi, kaj tial mi deziras al via kongreso la plej bonan sukceson.

Boutros Boutros-Ghali,
eksa Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj,
Ĝenerala Sekretario de la Internacia
Organizaĵo de Franclingvaj Landoj

oficisto. La buĝeto inkluzivas plialtigon de la baza kotizo (MA por Nederlando) de 103 gld. en 1998 al 105 en 1999, kio estas proporcie iom malpli ol la ĉi-jara inflacio en Nederlando.

La elekto de unua afrika estrarano signis novan etapon, dum ĉe la traktado de la financaj dokumentoj oni fermis ĉapitron: en Berlino ili estos ne plu guldenaj sed eŭraj, ĉar ekde januaro 1999 la librotenado de UEA estos farata en tiu nova mono. Pli gravos tamen la ĉapitro kiun la nova Estraro skribos; la entuziasmo kaj dinamikeco kun kiuj ĝi komencis sian laboron, promesas multon.

Osmo Buller

Esperanto: per si mem politika

Kiel vi rerigardas al la tri jaroj de prezidinto LEE Chong-Yeong?

Kiam mi eksciis ke Lee ne rekandidatiĝos kaj ke mi havas ŝancon fariĝi lia posteulo, mi petis lian helpon por konatiĝi kun la laboro de prezidanto. Li sendis al mi kopi-ojn de siaj cirkuleroj el la antaŭa jaro: miriga kvanto, kaj mirinda kvalito! Tio plu kreskigis mian admiron por la ekstera agado de LEE Chong-Yeong kaj por Kampanjo 2000, kiun li iniciatis. Mi esperas ke mi inde sekvos liajn paŝojn.

Ĉu vi ne havas tro da okupoj ekster la movado, estinte grava politikisto?

Mi estas sufiĉe vigla kaj sana; ankaŭ labo-remas, kiel dum mia tuta vivo. Povus okazi ke ĉi tiu estos la lasta grava tasko en mia vivo, kaj tial mi dediĉos al ĝi mian plenan tempon. Tion mi povas fari, ĉar ĉirkaŭ mia 70-jariĝo mi opiniis ke venis tempo por io alia ol politiko kaj rifuzis proponitajn taskojn. Nun, du jarojn poste, mi

konservas nur partatempan postenon provizoran, kiel prezidanto de konsilio pri reviziado de punoj al grave kondamnitaj homoj en Nova Sud-Kimrujo. Mi ja havas ŝatokupojn, sed miajn velboaton kaj farmeton mi ne sufiĉe ofte povas ĝui.

Cetere, politikisto mi fariĝis hazarde, tio estas: neplanite. Dum mia sufiĉe bunta vivo iam, junaĝe, mi eĉ konsideris golf-ludi profesie! Sed mi baldaŭ konstatis ke tia vivo ne taŭgas por mi, tial mi studis juron, iĝis advokato, universitatano — kaj fine politikisto. Kiel deputito en la federacia parlamento, hazarde mi deĵoris en tempo kiam kolapsis la longe reginta konservativa partio. En la nova, maldekstra registaro de Gough Whitlam mi iĝis justic-ministro.

Laŭ la tiama vic-ĉefministro, Jim Cairns, tiu estis "la plej idealisma registaro iam elektita en Aŭstralio".

Kaj ĝia fino estis amara. Estus komplike klarigi kial la ĝenerala gubernatoro Sir

Post azia prezidanto, unuafoje UEA estos gvidata de aŭstraliano, trans la jaron 2000. Jen intervjuo profilo de Kep Enderby.



Sen polemikoj

Ĉeestis en Montpeliero Yves Peyraut, la prezidanto de la Plenumkomitato de Sennacieca Asocio Tutmonda. Ni demandis lin pri SAT kaj pri ties rilatoj kun UEA.

Lastatempe sentebblas ia proksimiĝo inter la du organizoj iam antagonismaj. SAT kaj UEA neniam konkurencis en la senco ke la unua agas *per*, la dua *por* Esperanto. Pasintjare la unuan fojon okazis kadre de UK fakkunsido de SAT-membroj, kaj ankaŭ en ĉi tiu kongreso ni aranĝis neformalan kunvenon por membroj kaj simpatiantoj. Ĝi estis tre efika, ĉar tie multaj unuafoje ricevis informojn pri SAT.

Polemikoj ja okazas en la sino de SAT, same kiel interne de UEA, sed apenaŭ inter la du organizaĵoj: ni ne plu spertis streĉojn de post 1987, kiam SAT estis malinvitita kongresi en Pollando.

Multaj aktivuloj de UEA, eĉ estraranoj kaj oficistoj, estas membroj de SAT. Ĉu la fakto ke tio estas nuntempe sen-

probleme ebla, ne signifas tamen iaspecan perdon de identeco por SAT?

Ne, pro la esenca diferenco en la memdifino de la du asocioj, kiun mi jam aludis. Paradoxse, la manko de konkurencio kiu sekvas el tio, havas ankaŭ malbonan flankon, ĉar konkurencio — ja ne sinonima kun malamikeco — vigligas kaj motoras la evoluon.


Ĉu ja ne temis pri konkurencado en Nederlando, kie en 1994 unuiĝis la landaj asocioj de SAT kaj de UEA?

Efektive, kiam mi eksciis pri la plano de tiu kunfandiĝo, mi trovis ĝin malagrabla, ĉar per la unuiĝo perdiĝis la per-
Esperanta karaktero de la ĝistama asocio FLE, asocio cetere sufiĉe forta, tiam kun 450 membroj.

Kiel evoluos la rilatoj inter SAT kaj aliaj E-organizaĵoj?

Ĉiam eblas pri-
studi reciproke la proponojn. Cetere, SAT-anoj kaj neŭtraluloj bone kunlaboras preskaŭ ĉie;





Enderby oratoras en Montpeliero kaj intervjuiĝas en Roterdamo.

en landoj kun malsama situacio temas pri generacia konflikto, ne pri ideologia.

Kio malhelpas ke SAT havu eĉ pli alt-nivelajn ligojn kun UEA?

Ankoraŭ ekzistas antaŭjuĝoj en ambaŭ asocioj. Iuj neŭtraluloj imagas SAT-anojn danĝeraj homoj; ĉe SAT iuj supozas politikan konservemon ĉe UEA. Sed mi diru al vi: ekde la 50-aj jaroj mi partoprenis en kvin UK, kaj mi atestas ke la etoso iĝas ĉiam malpli rigida kaj burĝa ĉe UEA. Nun mi jam apenaŭ vidas diferencon inter la etoso de UK kaj de SAT-kongreso!

Kiel vi scias, dum la Aŭgsburga SAT-kongreso en 1997 okazis debato pri mesaĝo sendita de UEA: nia unuanime alprenita decido salutis la proponon pri Kampanjo 2000 kaj mandatis la Plenumkomitaton ricevi pliajn informojn de UEA kaj alpreni iniciatojn. Sekvante tiun decidon, la PK sendis reprezentanton por partopreni la unuan kunvenon de la Strategia Forumo en ĉi tiu UK. Kiam UEA aplikas aktivan neŭtralecon, batalante por homaj kaj lingvaj rajtoj, tio faciligas por SAT renkontiĝi kun UEA sur tiu kampo de same per-Esperanta kiel por-Esperanta agado. ★

John Kerr demisiigis ĝin, sed oni foje nomis lian agon "konstitucia puĉo". Do, jen en iu tago mi estis ministro, kaj en la sekva tago jam senlaborulo. . . nu, ne longe, ĉar mi refariĝis advokato.

Vi agadis en la politika maldekstro, kaj en Esperantujo vi estas membro ankaŭ de Sennacieca Asocio Tutmonda. Antaŭ jardeko, malfacilus imagi ke SAT-ano iĝu prezidanto de UEA. . .

Miaj politikaj opinioj, evidente, evoluis dum mia vivo. Nun plej gravas por mi la respektigo de homaj rajtoj, la heredaĵo de la tradicia liberalismo: ne tiu ekonomia, sed la liberalismo socia, "individua libereco kaj forigo de privilegioj", kiel diras PIV. Mi estas membro de SAT ĉar — kvankam miaj prauloj en pluraj generacioj estis aŭstralianoj — mi forte sentas min sennaculo, aŭ kosmopolito, aŭ mondĉivitano. . .

UEA fidelas al sia proklamita politika neŭtraleco, sed statute esceptas "la lingvan problemon en internaciaj rilatoj". Fakte, se ni klopodas rigardi nian movadon de ekstere, ni devas konstati ke Esperanto per si mem estas politika afero! Lingvo ne povas ne roli politike. Labori por Esperanto signifas labori por lingvaj

rajtoj — kiuj apartenas al la fundamento de la homaj rajtoj —, kaj batali por homaj rajtoj estas politika ago.

Kiel kandidato, vi menciis inter viaj celoj: "emfazi ĉie la gravecon de la malgrandaj naciaj lingvoj kaj de egaleco inter lingvoj". Ĉu tio signifas doni prioritaton al la agado pri lingvaj rajtoj?

Nu, ni havas preme urĝajn taskojn ankaŭ en

aliaj terenoj, sed ni ne povas ne atenti pri la demando de lingvaj rajtoj en la nuna tempo, kiam, en la tutmondiĝa procēzo, ŝrumpas la rolo de naciaj ŝtatoj, kreskas la signifo de neregistara organiziĝo, graviĝas interregionaj kaj ĝemelurbaj kontaktoj kaj translimaj ligoj.

Kaj translime oni plej ofte klopodas komuniki per la angla. . .

La angla lingvo estas pelata antaŭen de multaj faktoroj, ekonomiaj kaj politikaj. Estas kompreneble ke utilismaj lokaj elitoj preferas lerni la anglan ol Esperanton.

Per kiuj argumentoj ni do proponu Esperanton?

La komunaj valoroj, la e-ista vivmaniero estas jam nun kaj ĉie observeblaj, eĉ envieblaj kaj imiteblaj. Niaj idealoj havas tiel daŭran allog-povon, nia komunumo estas tiel forta ke, eĉ se UEA kaj SAT morgaŭ malaperus, Esperanto tamen travivus.

La "fina venko" ne okazos morgaŭ: nek de Esperanto nek de la angla. Dume, ni multigu la praktikajn okazojn utiligi Esperanton kaj vaste informu pri niaj agadoj.

Ĉu la nova Estraro jam eklaboris?

En la UK ni jam kunsidis — sen la forestantaj Gbeglo kaj Kniivilä —, ĉar ni konsciis ke utilas plej frue ekgrimpri la krutan deklivon de la Estrara laboro. Tamen, estas ankoraŭ tro frue por deklari definitivajn celojn. Reveninte de eŭropa vojaĝo, en septembro mi kontaktos ĉiujn estraranojn, kaj ni daŭrigos viglan konsultiĝon — precipe komputil-rete — jam antaŭ la sekva kunsido, planata por februaro en Roterdamo. ★

La ponto kaj la kolonoj

La sperto kaj sento de komuneco ĉirkaŭ Mediteraneo ŝajnas nerevokeble aparteni al la pasinteco. Aŭ ĉu tamen...?

Meditado ĉe la tutmonde konata Avinjona ponto

Vojaĝante al Montpeliero aŭtobuse, mi renkontis plenajn aŭtomobilojn kun valizoj supre. Ili estis de marokanoj, al kiuj mi parolis arabe. Ili ege ŝatis tion. La afero pensigis min pri tiuj tempoj kiam Mediteraneo estis sama lando: ne estis problemoj iri de parto al parto; ili havis saman moneron, saman lingvon.

Tiel enkondukis la kongresan temon Fabrizio Pennacchietti, profesoro pri ŝemida filologio en Torino. La temon prezentis tri pliaj prelegoj kaj debato.

Sola, sed trafa

Ĉu eblas trakti tiklan temon kiel “Israelo kaj islamo” se, anstataŭ diskuto antaŭvidita kun islama ekzistado, israela samideano devas prezenti la temon solule? Jozefo Ŝemer elstare faris sian eblon por paroli objektivite. Li ja klarigis ke manke de kundiskutanto li preferas ĝuste ne tuŝi la tro kompleksan temaron politikan, sed nur la rilatojn inter la kulturoj araba kaj juda en Israelo. Tamen, iuj post-prelegaj demandoj ŝajne forgesis tion. Bedaŭrinde la foresto de diskutpartnero, sed kompanse ni povis aprezi klaran kaj kleran elmeton, kun foto precizeco, de sociaj kaj kulturaj rilatoj en nia baldaŭa kongreslando.

Fabienne Berthelot (Nederlando)

Nekompreneble, debaton ni spertis ne post la lasta prelego, sed inter la unua kaj la dua, sub la titolo “Landaj asocioj en Mediteraneo”. Tie relevigis la demando pri agnosko de Kataluna E-Asocio kiel landa asocio de UEA. Iuj plendis ke la kongrestemo reduktiĝas al Mediteraneo, kaj ne etendiĝas al aliaj kulturoj, kiel tiu belga aŭ irlandia. La temo povus ampleksi ankaŭ la direkton oriento-okcidento, ĉar ponto necesas ne nur inter norda kaj suda Mediteraneo. Laŭ komento de brita samideano, pontoj bezonas kolonojn, kaj tiuj povus deveni ankaŭ el kulturoj ekster Mediteraneo mem.

En posta tago sekvis triprelega sesio. Carmel Mallia en “Historio de Malto” substrekis la gravecon de la malta kavalira ordeno kaj de Napoleono en la historio de sia lando. Gerrit Berveling (redaktoro kaj tradukinto de *Antologio latina*) rakontis la historion de la romia imperio, kaj kiel Mediteraneo iĝis Mare Nostrum (“maro nia”). Antonio Marco Botella (aŭtoro de *Lirikaj perloj de Al-Andalus*) ne povis ĉeesti pro malsano, sed li sendis sian prelegon pri Al-Andalus, brila mediteranea ponto inter kulturoj.*

La prelegdebato “Israelo/Islamo” komenciĝis post dekminuta prokrasto, pro neĉeesto de islamano kiu povus debati kun Jozefo Ŝemer, israelano. Li fakte prezentis la nunan staton de

aferoj en la ŝtato Israelo, sen paroli pri eblaj solvoj. La prelego ne estis altkvalita kaj lasis multe da temoj neresponditaj. Ŝemer ne citis alian aŭtoritaton ol sian propran sperton kiel israelano, kaj ne uzis ian ajn statistikon aŭ citaĵon de gravulo politika aŭ scienca el sia lando. Post la prelego, li sukcesis ne respondi al iuj tre konkretaj demandoj.

Katrin Texier (Francio) parolis pri problemoj en Berberio, norda parto de Alĝerio. Ĉi-kaze araboj estas kulpoj, ne viktimoj. Fakte, en Alĝerio ĵus estis malpermesita la oficiala uzo de la berbera kaj franca lingvoj. Kvantam ŝi eraris pri la disvastiĝo de la lingvo berbera (neniam parolita en la Kanarioj), ŝia prelego sendube valoris por kompreni kial Mediteraneo ne estas ponto inter kulturoj: naciismo kaj viktimismo malhelpas tion.

Fabrizio Pennacchietti finfine tiris kelkajn konkludojn por ni pri la kongresa temo: laŭborde de Mediteraneo ekzistas multaj miljaraj kulturoj, kiuj iam unuiĝis sub romia rego, tiel kreante el Mare Nostrum ponton inter si; sed nun ili apartiĝis denove. Esperanto verŝajne povas funkcii kiel nova ligilo inter ili ĉiuj, sed ankoraŭ multe da laboro necesas por atingi tion. En la solena fermo ankaŭ Renato Corsetti komentis la temon tiusence.

Jesuo de las Heras (Hispanio)

*legebla ĉe <http://www.distrito.com/esperanto/k40al-an.htm/> aŭ mendebla de la aŭtoro de ĉi tiu artikolo

De bakterioj al eksterteranoj

Universitat-nivelaj prelegoj en UK ĉiujare demonstros ke la post-restado de E-o en scienco ŝuldiĝas malpli al iuj mankoj de nia lingvo ol al malfavora lingva konjunkturo en la scienca kampo.

“La nuntempa scienca kaj akademia mondo pli kaj pli uzas la anglan kiel laborlingvon kaj por internaciaj kaj ofte ankaŭ naciaj aranĝoj. Tio tamen ofte malhelpas la progreson de la scienco, kiu bezonas la liberan interŝanĝon de scioj kaj spertoj sur la persona nivelo” — enkondukas Amri Wandel la kajeron kun la prelegoj de Internacia Kongresa Universitato (IKU), unu el la plej grandaj vendosukcesoj de la kongresa libroservo.

Ok alte kompetentaj universitatanoj traktis sciencajn temojn en stilo komprenebla por kleraj nefakuloj. Tri el la prelegoj estis daŭrigitaj de AISIKU-sesio, kurso kiun Akademio Internacia de la Sciencoj kaj IKU komune aranĝas jam la trian fojon en UK.

Unu el ĉi tiuj lekcioj estis “Historio de matematikistoj kaj matematikistoj en la historio” de prof. Carlo Minnaja, historiografia temo neniel seka: li montris ke scienculoj kies nomon ni konas (aŭ forgesis) nur pro iliaj formuloj kaj ekvacioj, estis homoj kun karno kaj sango, tute ne fremdaj al politiko kaj socia vivo. Minnaja ankaŭ konvinke montris ke la konceptoj de matematiko, kiujn ni volonte kredas universalaj veroj, tamen forte dependas de la lingvo en kiu oni pensas ilin.

Plue en la kadro de AISIKU, prof. Tyburecusz Tyblewski surprizis tiujn kiuj ankoraŭ ne konsciis ke turismo aĝas plurmil jarojn, kaj ke ĝi ekestis ĝuste en Mediteraneo, kies geografia realo frue invitis al intertnaj vojaĝoj.

La tria AISIKU-preleganto, d-rino Ilona Koutny, traktis problemon kulturan kaj lingvan: Ĉu Esperanto kreis propran kulturan fonon, ĉu ĝi portas iun “universalan” kulturon, aŭ ĉu ĝi peras naciajn kulturojn sen sintezo? Laŭ jamaj esploroj kaj studoj, kaj

ankaŭ surbaze de sia interreta enketo pri salut-manieroj en Esperantujo, ŝi konkludis ke la fleksebla Esperanto ebligas, pli ol alia fremda lingvo, transdoni erojn el la propra kulturo de la komunikanto; sed E-o ankaŭ jam evoluigis propran kulturon, kiun tamen ne ĉiuj ĝiaj uzantoj posedas samnivele.

D-ro José Antonio Vergara, specialisto pri epidemiologio, klarigis ke, nun kiam epidemiaj mal-


visto van Oostendorp klarigas per la esenca simileco de ĉiuj homaj mensoj.

Advokato Miguel Faria de Bastos alportis ideojn nepre konindajn por vidi en la sama pensokadro lingvo-politikon kaj homajn rajtojn. Skizinte la historion de la koncepto kaj la realo de homaj rajtoj, li ĝisvenis ĉi ties “trian generacion”. Al ĉi tiuj apartenas ankaŭ lingvaj rajtoj, koncepteblaj kiel rajto ne nur al la propra lingvo, sed ankaŭ al la uzo de lingvo neŭtrala.

Por sia brila lekcio pri “Shakespeare — interlingvisto” prof. Humphrey Tonkin tralegis la Ŝekspiran verkaron el la vidpunkto de lingvemulo. Laŭ lia analizo, Ŝekspiro estis fascinita de la rilato inter lingvo kaj potenco; specifaj lingvaj ecoj ĉe liaj rolantoj servas ne nur ties karakterizadon, sed ankaŭ pluirigon de la intrigo. Ŝekspiro plene konsciis ke ne nur la surscena agado, sed ankaŭ la uzata lingvo efikas sur la



Anaŭda fotoj: Francjo Veuthrey



Barbara Despiney (supre) rektoris tem-riĉan IKU, en kiu i.a. José Antonio Vergara lekciis pri epidemiaj kaj infektoj.

sanoj de la pasinteco ŝajnas malaperintaj, la homaro ofte mem kreas vivteron por antibiotiko-rezistaj bakterioj per la ekonomiaj kaj ekologiaj ŝanĝoj kiujn ĝi kaŭzas.

Inspirita de la kongresa temo, lingvisto prof. Marc van Oostendorp elmontris ke almenaŭ unu ponto certe kunligas la mediteraneajn popolojn: iliaj sonoj. Kvankam por supra observanto ĉi ties lingvoj sonas tre malsame inter si (en iuj berberaj dialektoj eĉ ekzistas vortoj sen vokaloj!), estas tamen montreble ke iliaj sonstrukturoj estas konstruataj laŭ similaj principoj — simileco kiun la Chomsky-ana ling-

publikon, kaj tial li ne hezitis utiligi dialektaĵojn, aŭ eĉ inventitan lingvon en *Fino bona ĉio bona*.

Ne malpli fascina ol Ŝekspiraj lingvaĵoj estas la demando: ĉu ekzistas civilizacioj aliloke ol sur nia Tero? Prof. Amri Wandel raportis pri la sciencaj esploroj ĉi-rilataj, kiel analizado de radio-signaloj eksterteraj. (Do, ne temis pri prelego por fanatikuloj de Neidentigitaj Flugantaj Objektoj!) Wandel venis al la konkludo, eble elreviga, ke la nuna stato de la scienco ankoraŭ ne ebligas definitivan respondon pri la ekzisto de civilizitaj eksterteranoj.

István Ertl



Yvette Vierre, iniciatinto de la Montpeliera UK, ĝojas pri la laboro farita.

GIĈETOJ
AMERIKA
AGADO

Ne nur en kunsidoj oni planis novajn agadojn.

GIĈETOJ
AMERIKA
AGADO

GIĈETOJ
AMERIKA
AGADO




Kongresa



Prof. Lee transdonas kalkulilon de Societo Zamenhof al Louis Zaleski-Zamenhof.



Raymonde Pérault super nova numero de Koko



En la Montpeliera varmego bongustis akvomelonoj.



Internacia Ĥoro



Dimitar Terziev, ĉefdirigento de la muzika Esperantujo

La plej granda libroservo
de la mondo ekster
Roterdamo



Kongresano n-ro 1
rekonkeris sian numeron
ankaŭ por Berlino-




Japanoj kolektis subskribojn apoge al la
Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.



Junaj oomotaninoj



Simo kaj Hortensio — unu el miloj da ĝojaj revidiĝoj



Redaktoro István
Ertl submetas la
plej lastan n-ron
de nia gazeto al
la prijuĝo de la
legantoj.



Partoprenantoj de
la Infana Kongreseto
kantas al la kongresanoj.



Tahira Masako
fieras pri
duonpaĝa
intervjuo
en grava
ĵurnalo.



Helga Farukuoye, ricevinto de
Premio Degučī, ne ŝaŭzis en
afrika agado.



kalejdoskopo

Ne mankis tempo por babili
dum la bankedo.



Nout-Bernat Storie &
Footeuses de OIA
dancigas laŭ
"okcitanafrik-
nordorientbrazilaj
ritmoj".



Ĉu du estas tro?

Kiu volas aserti ke al la Esperanto-teatro mankas fajro, mankas fantazio? Certe neniu kiu bisante aplaŭdadis la du kongresajn teatraĵojn, prezentitajn de Solen' kun Krizalido-Teatro kaj de Vida Jerman.

Sursceniĝis du monodramoj similaj, samtempe tre malsimilaj. En *Meluzina La Granda Feino*, animita de Solen', temis esence pri monologo (malgraŭ sursceneja kontrabasisto, kiu kun la aktorino muzike dialogis kaj kiu fakte elbuŝigis unusolan vorton: "Jes!"). Kaj kia monologo: pli ol 50 presitaj paĝoj perfekte parkerigitaj — vera majstraĵo! Same *La rompita virino*: monologo, en kiu Vida Jerman tamen dialogis kun surbendigita voĉo de perfida edzo.

Do du preskaŭ-monologo, en kiuj rimarkindas eksterordinara emcia paraleleco, malgraŭ tio ke enhave dividas ilin pluraj jarcentoj. *Meluzina* baziĝas sur keltaj rakontoj kaj mitoj el la 12-a-15-a jarcentoj; *La rompita virino* sur romaneto de Simone de Beauvoir el la nuna jarcento. Tamen, tamen... en ambaŭ ĉefrolis ĵaluzo, malfido, trompo kaj malfeliĉo: ĉu ni homoj en la fluo de tempo vere evoluis?

Same paralelis la teĥnika realigo de la prezentaĵoj: ambaŭkaze aparte gratulindas la lumigistoj. Ankaŭ la Krizalido-skipo, kies dekoracioj, sugestantaj jen fortun-insulon Avalon, jen arbaron, jen palacon, sorĉis la spektantaron. Foje ĝenis la radio-mikrofonoj (aktoroj: ne frapu la bruston, se sur ĝi kuŝas kaŝa mikrofono!), sed la sursceneja tutaĵo memorinde imponis.



Vida Jerman

Diferencis tamen la stilo de ambaŭ teatraĵoj, kiel pluvegaj disde sunegaj kongresaj tagoj. Solen' preskaŭ patrinece — helpate eĉ de granda, sursceneja bildolibro, kies paĝojn ŝi turnadis — rakontis kvazaŭ al infanoj historion pri feino, kiu edzi-



Solen' en Meluzina

niĝas kun mortulo. Tiel ŝi distris, amuzis kaj instruis sian publikon. Distris — pro la fantazio, la imagpovo entenata en la antikva mitologio; amuzis — pro la neforgeseble misformitaj idoj kiujn la feino naskis; kaj instruis, ĉar eble — kiu scias? — Meluzina ankoraŭ vagas "En serĉado de kunulo / De kunulo ne hontanta / Ja pri ŝia Dia formo / Kaj fidelus al la ĵuro."

Alie *La rompita virino*. Dum Solen' petis pri kompatato por rompita virino, kies sorto restas feina, Vida Jerman petis pri kompatato por rompita virino, kies sorto povas esti ĉies. Solen' tuŝis kapojn, Vida Jerman korojn. Kiu ne kapablas identiĝi kun la rompota Monique: "Mi bezonas mian angulon"? Dekomence Vida Jerman lerte engaĝis sian publikon, ĝin invitante en la disfaltantan mondon de mezaĝa virino, kiu volas nur ke ŝia kokranta edzo amu ŝin. Espero vana... fine por Monique restas nur timo. Timoj kaj soleco, sed soleco komuna al miloj, milionoj. Nigra, pensiga peco, kiun bedaŭrinde maltrafis multaj kongresanoj jam foririntaj post la unua teatraĵo. Ĉu du altkvalitaj sed sinsekvaj prezentaĵoj troas por verda spektantaro?

Entute elstara vespero, malgraŭ fojfoja ronkado kaj la dumprezenta en-kaj elirado de kelkaj kongresanoj, kvazaŭ teatro estus atendejo dentista. Kaj alia, eta ĝeno: keltaj mitoj, franca romaneto, ambaŭ genie esperantigitaj — sed kial dum teatra vespero neglekti originalan dramon? Organizantoj de ontaj UK-oj — bonvole pripensu!

Paul Gubbins (Britio)



Mirinda rekviemo

Jen duobla mirindaĵo: la brila teksto *Rekviemo por la perdintoj* de Vladimir Krstić, vere filozofia, estis bonege tradukita (de Živko Ivanović), kaj trupo de junaj geaktoroj altnivele prezentis tiun komplikan kaj subtilan teatraĵon! Mi apenaŭ kredis ke temas pri gimnazianoj (el Jagodina, Serbio). Mi esperas ke ili surscenigos la spektaklon denove kaj konsideros registri ĝin sur vidbendo. Kaj, kompreneble, ke iu saĝa eldonisto aperigos la tekston.

Miko Sloper (Usono)

Velado sur muzikaj ondoj

Kongresante en romantika lando de amo, ni ne povis maltrafi la ravajn, tipe franc-stilajn kanzonojn — kaj ni krome profitis el nia apudmara situo por kunveladi kantante. La kvin-kapa kanto- kaj teatrotrupo La Kompanoj (de la Bordoza asocio Esperanto-Gironde) fariĝis la ĉefmotoroj kaj ĉiĉeronoj de nia agrabla kunpromenado sur ilia ŝipo “Tuj la kompanar”.

Plezure malstreĉaj en niaj foteloj, ni hisis la velojn: nia promenado ekis per fama kanto el la repertuaro de la Esperanta grupo Kajto. Iom poste aperis ankaŭ alia konata melodio Esperanta: *Ali Bensali* de JoMo. Kvin el la dudek prezentitaj kanzonoj estis aŭtoritaj de du el La Kompanoj. Sed intertempe ni plene konvinkigis ke “la franclingva kantaro riĉas kiel Medi-

Ĉantoj de



maskulo

Solo ja ludas unuope, sed la muziko ne estas la sola flanko de lia prezentaĵo. Li dancas kvazaŭ pupo pendanta de ŝnuretoj, kaj spicon surrealisman aldonas pantomimeca ŝmink-masko. Dum la tuta koncerto montriĝas lumbildoj de abstraktaĵoj — molekuloj, nuboj, planedoj —, kiuj donas guston de sciencfikcio. Sed kio pri la muziko mem? Temas pri futurisma kombinaĵo de nov-epoka kaj tekno-populara stiloj. La baritona voĉo miele kunsonas kun la sinteziloj, kreante muzikaĵon vere unikan, kiu estas bona evoluaĵo de antaŭaj albumoj de Solo. Kelkaj melodioj tro utiligas solan noton kaj do pli bone nomigis ĉantoj ol kantoj. Aĉetanto de la kasedo devos nur imagi la vidan flankon de la spektaklo; mi esperas ke iam aperos vidbenda versio!

Miko Sloper (Usono)

Pluvo dancigas subŝirme

La okcitana vespero, kunorganizita kun la urbo, estus devinta okazi subĉiele kiel publika spektaklo, sed pro pluveto (ne kutima komence de aŭgusto) ĝi devis translokiĝi en la kongresejon. Tial ne partoprenis kamargaj surĉevalaj brutgardistoj. Tamen la grupo Saba-Saba (dancistoj kaj ludantoj de fifro, perkut-instrumentoj kaj hobojoj) dancige invitis la kongresanojn en la salonon Zamenhof. Tie la publiko ĝuis unue la akordione, kontrabase kaj perkute akompanatan kantiston Patrik — kiu miksis tradicion kaj modernon, lingvojn francan kaj okcitanan — kaj poste la ciganan grupon de Kiko kaj liaj du fratoj. La publiko abunde aplaudis, kaj multaj kuraĝuloj eĉ ekdancis sur la scenejo.



Fabienne Bernhet

teraneo, pro la renkontoj de diversaj kulturoj portataj de la enmigrintoj”, kiel Charles Aznavour (armena), Henri Salvador (gvajana), George Moustaki (greka), Nino Ferrer (itala) ktp. Ni ĝuis ankaŭ la muzikon de aliaj franclingvaj kanzonistoj kiel Pierre Perret, Jacques Brel, Edith Piaf, Tri Yann kaj, kompreneble, Jacques Yvart, kiu persone aliĝis al nia kantemularo por kune atingi la kulminon kaj prezenti al ni kvar kanzonojn de sia amiko George Brassens, mita elstarulo de la kanzona ĝenro. Tiel nia ŝipo atingis la finan celon kaj alboridiĝis en la havenurbeto Sète — la naskiĝloko de tiu fama poeto-kanzonisto.

Ni alvenis, sed ankoraŭ neniu volis elŝipiĝi dank’ al la tre profesia laboro de nia ŝipanaro. Apartan laŭdon meritas la du ĉefinstrumentistoj: Thierry Faverial (gitaro) kaj Fabrice Morandeau (akordiono). Multe da laboro investis ankaŭ Marie-Paul Rabiller por prepari la voĉan parton de tiu spektaklo, el kiu speciale menciinda estas la natura voĉtalento de Marcel Redoulez. Gratulojn al li ankaŭ pro la tuta kuraĝo kaj entuziasmo realigi tiun interesan artan ideon.

Espereble, nia ŝipanaro baldaŭ preparos novajn vojaĝojn, kaj tiam ni ĉiuj plezure re-aliĝos por kune malkovri novajn horizontojn kaj kial ne, eĉ pli malproksimajn...

Zdravka Bojčeva (Bulgario)

Belkanto el la fingroj

La solan dumkongresan plezuron alportis la brila kaj tre profesia koncerto de Aldo Fiorentin, itala pianisto jam bone konata pro prezentoj dum la lastaj UK-oj, premiita en Belartaj Konkursoj.

En sia ĉi-jara koncerto majstro Fiorentin prioritatis sian samlandanon Donizetti. La eksterordinaraj melodioj kaj la rava itala *bel canto* ĉi-foje sonis ne per bela voĉo operkantista, sed fluis el la fajnaj fingroj de pianmagiisto. Aŭdiĝis la fama oper-ario *Una Furtiva Lacrima* — plenplena je amo kaj tene-reco —, simfonioj kaj kvar valsoj.

La duan parton Fiorentin dediĉis al la kongreslando. La komponisto de la unua verko, Chopin, estis ja poldevena, sed pasigis la plej grandan parton de sia artkrea vivo en Francio. La aŭtoro de la dua kaj lasta muzikero, Debussy, estis la kreanto kaj ĉefa reprezentanto de impresionismo en muziko. Liaj verkoj, ĉiam koloraj kaj samtempe diafanaj, portas novajn elementojn kaj senton en harmonio, ritmo kaj, ĉefe, melodio.

Nova fenomeno en la Esperanto-kulturo, la virtuoza Aldo Fiorentin ludas ĉiam elegante, milde kaj kun multa lirikismo. Ni senpacience atendas liajn pluajn agrablajn surprizojn.

Zdravka Bojčeva (Bulgario)

Pretaj kunlabori neburokrate

Ĉiuj signifaj partoj de la Esperanto-komunumo estis reprezentitaj en la unua kunsido de la Strategia Forumo de la E-movado.

La unuan fojon, almenaŭ en la historio de la Esperanto-movado post la dua mondmilito, okazis tia kunveno. Ĉeestis kvindek da asocioj grandaj (UEA, SAT, ILEI, TEJO,

AIS), mezgrandaj (la asocio de fervojistoj, katolikoj, sciencistoj, kuracistoj, komunistoj, etnistoj ktp) kaj malgrandaj (lokaj klerigaj centroj kaj aliaj asocioj).

Mi tutkore salutas vin ĉiujn,

kunvenintajn por kongresi en tiu bela, kulture radianta urbo Montpeliero, ĉe Mediteraneo, per kies marbordo mi mem, antaŭ kvardek jaroj, unuafoje eniris Francion, al kiu mi tuj enamiĝis kaj kiu sekve fariĝis mia elektita kultura patrolando.

Tial la kongresa temo, "Mediteraneo — ponto inter kulturoj", prezentas por mi persone tute specifan intereson, kvankam ĝia esprimmaniero iom konfliktas kun mia inĝeniera arto. Kial la maro estu prezentata kiel ponto? Dum mia profesia aktiveco mi ja kontribuis al konstruado de pontoj trans maroj; se maro estus mem ponto, tiam mia laboro aperus do sencela!

En tiu senco Mediteraneo do ne estas ponto; tamen, ĝiaj marbordoj akuŝis kulturojn de la tri kontinentoj ĝin ĉirkaŭantaj. Tie naskiĝis kulturo de la antikva Egiptujo, kulturo helena, kulturo romia; tie evoluis tri grandaj religioj de la nuntempo: la hebrea, la kristana kaj la islama. Al ni, homoj de bona volo, al ni, esperantistoj, estu donita la tasko konstrui la ponton inter ili, la ponton inter la luliloj de kulturoj, de religioj, ĉiam memorante la noblan strofon de nia *Preĝo sub la verda standardo*: "... kristanoj, hebreoj aŭ mahometanoj / ni ĉiuj de Di' estas filoj ..."

Ni estu inĝenieroj de la ponto trans Mediteraneo, de la ponto de kompreno kaj de la sekva reciproka estimo de la diverseco de kulturoj florantaj sur ties marbordoj; de la diverseco ne plu estonta fonto de malamo inter ili, sed diverseco de kulturoj kiu estu konsiderata kiel grandega riĉeco de la homaro.

Anstataŭ ŝipoj iam veturigintaj trans Mediteraneon legiojn de Romo por pereigi Kartagon kaj ĝian kulturon, anstataŭ ŝipoj de krucmilitantoj batalintaj kontraŭ alireligianoj, nia ponto servu vehiklojn de amikeco, por ke Mediteraneo ne plu dividu sed ligu la diverskulturajn grupojn en unu grandan rondon familian.

En la nomo de la familio Zamenhof mi deziras planan sukceson al la 83-a Universala Kongreso de Esperanto.

D-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof

La debaton en la Strategia Forumo enkondukis prelego de Humphrey Tonkin. Jen ĉerpo el la kompleta teksto, kiu aperos aparte ĉe UEA.

La historio de Esperanto plenas je klopodoj organiziĝi aŭ eviti organiziĝi, kaj je luktoj por unuigi aŭ eviti unuigi la parolantaron de nia lingvo. Unuflanke Zamenhof mem insistis pri la baza unueco de la lingvo kaj la neceso respekti la Fundamenton (kvankam en tiu rilato li estis eventuale pli fleksebla ol la sekvantoj); aliflanke li profunde dubis pri la valoro de organizaĵoj, kun ties prezidantoj kaj sekretarioj kaj komitatoj, por meti limojn kaj doni direktojn al la esenca homa libereco, kiun li celis per sia lingvo.


Tra la jaroj, tiu baza debato neniam malaperis, tre ofte spegulante emojn kaj tendencojn en la ĝenerala socio. (...) Hodiaŭ, en nia postmoderna mondo, la nocio de E-movado, kun gvida asocio (nome UEA) ĉe ties pinto, kaj Estraro ĉe la pinto de tiu pinto, diskolapsis en la pli ĝenerala etoso de pridubo de organizaĵoj strukturoj kaj "definitivaj solvoj" al tiel nomataj "problemoj." (...)

Sekve, ni ne komplete certas kiuj ni estas. Ekzistas tiuj, ankoraŭ iom grandnombre, kiuj kredas ke UEA devas doni siajn direktivojn kaj la peonoj devas ĝin sekvi. (...) Iuj preferas paroli ne pri movado sed pri ko-

La unuan enkondukan prelegon prezentis Humphrey Tonkin (ĉi-sube). Yves Peyraud, prezidanto de la Plenumkomitato de SAT, parolis pri la nuntempaj taskoj de E-asocioj. Aleksander Korĵenkov ne povis ĉeesti, sed li skribis kontribuis per *Esperanto post la jaro 2000*, teksto jam aperinta kiel unua ero de la UEA-serio *Diskutkaĵeroj*.

Ĉiu ĉeestanta asocio prezentis sin kaj sian agadon. Sekvis vigla debato, kiu devigis la organizantojn plilongigi la renkontiĝon je unu horo.

Ĉu asocio, movado, komunumo, civito?



Humphrey Tonkin

munumo. Ili emfazas ke tio kio igas homojn utiligantoj de Esperanto, estas tio ke ili parolas ĝin. Kiel parolantoj de difinita lingvo, ili konsistigas lingvan komunumon, kies unueco konsistas en tio ke la lingvo estas portanto de certaj kulturaj komunecoj, kiuj difinas ĝian semantikon kaj estas de ĝia semantiko difinitaj. (...) Ankoraŭ aliaj lastatempe priskribis Esperanton kiel civiton — kvazaŭ temus pri aŭtonoma strukturo, simila al la konvencia nocio de malnovgreka urboŝtato, en kiu ĉiu havas certajn rajtojn kaj en



La ĉefa rezulto de la kunveno estas ke montriĝis granda preteco je duflanka aŭ plurflanka kunlaborado inter ĉiuj asocioj. Tio jam dum la venonta laborjaro devus doni fruktojn en la formo de kunlabor-aranĝoj inter la fakaj asocioj. Estis krome decidite daŭrigi la ekziston de la Forumo en la nuna neburokrata maniero (prezidantoj aŭ Estraroj rilatas inter si) kaj pritaksi la rezultojn dum la venonta UK en Berlino.

Renato Corsetti



Fransjo Veurhey

kiu decidoj estas komune farataj. En tiu civito, la diversaj Esperanto-organizaĵoj, inter ili UEA, estas esence samrajtaj, kaj ne ekzistas hierarkio. Iuj proponas ke oni kunvoku kunvenon de la civitanoj, kvankam ne estas plene klare pro kio oni tion faru.

Ekzistas kompreneble aliaj manieroj priskribi nian komunan aferon. (...) Mi ne proponas hodiaŭ ke vi nun elektu la vorton, la priskribilon, kiun vi preferas. Ne temas pri iu infanludo aŭ televida kvizoprogramo. Efektive, tiun infanludon jam energie praktikas diversaj homoj inter ni, kiuj preferas muldi Esperanton al siaj propraj antaŭjuĝoj ol muldi sian temperamenton al la toleremo kiun nia lingvo, per sia ekzisto mem, postulas. Ekzistas inter ni certaj anarkiaj tendencoj: ni ne akceptas la ricevitaĵajn opiniojn pri la rolo de lingvoj en la socio, kaj ni insistas iri propran vojon. Aliflanke, ekzistas certaj dikta-

turaj tendencoj: ni insistas ke la mondo havu la formon kiun volas ni, kaj ne la aliaj. (...) Niaj anoj fariĝis parolantoj kaj uzantoj de Esperanto ne ĉar ili konformemas al la socio, sed ĉar ili ne konformemas. Tiu manko de konformiĝo etendiĝas ankaŭ al la Esperanta parto de iliaj vivoj. Sekve, ili ofte dediĉas grandan energion al la rezistado de aŭtoritato, reala aŭ imagita. Kiel nekonformistoj, foje ili ankaŭ malhavas sociajn lertojn, kaj sekve ili faras siajn atakojn je la plej baza kaj kruda persona nivelo. Tiaj

emoj plagas eĉ la plej altajn Esperanto-instituciojn. (...)

Se entute ni deziras elformuli bonan strategion por la estonto de nia lingvo, ni devas tion fari en etoso kaj medio en kiu ni lasas niajn antaŭjuĝojn kaj nian potencavidon ekstere. Tiuj kiuj konsideras Esperanton civito, pravas en tio ke ĉiuj voĉoj devas esti aŭdataj, sed ne en tio ke ili eventuale deziras simple forigi unu hierarkion kaj anstataŭigi ĝin per alia. Tiuj kiuj preferas koncepti ĝin kiel socion aŭ komunumon, pravas en tio ke Esperanto ne

estas nur ilo, sed efektiva lingva kulturo, kiu bezonas flegadon similan al tiu bezonata de ĉiuj aliaj kulturoj. Tiuj kiuj konsideras ĝin movado, pravas en tio ke mondo kun Esperanto estas preferinda al mondo sen ĝi, eĉ se ni ne plene konsentas pri la precizaj avantaĝoj kaj malavantaĝoj. Kaj se Esperanto estas unuavice iu asocio, ni laboru pli intense por igi nian UEA ankoraŭ pli utila al la parolantaro de Esperanto ĝenerale, tiel ke ĉiuj libere kolektiĝu en ĝia sino.

Humphrey Tonkin

Kongresa Rezolucio

La 83-a Universala Kongreso de Esperanto,

kunvenanta en Montpeliero, Francujo, de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1998, kun 3133 partoprenantoj el 66 landoj,

salutante la 50-an datrevenon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kies respekto estis kaj restas esenca kondiĉo de la laboro por Esperanto,

debatinte pri la nuntempaj ideoj kaj laboroj de interregistaraj kaj neregistaraj organizaĵoj rilate edukadon al paco kaj al reciproka toleremo, kun aparta atento al mediteraneaj landoj,

analizinte la kontribuon de la Esperanto-komunumo, realan kaj potencialan, al tolerema, multkultura mondo,

alvokas

al Unuiĝintaj Nacioj, al ties instancoj, kaj al neregistaraj organizaĵoj, ke ili donu pli grandan atenton kaj serĉu eblan solvon al la problemo de la lingva dimensio de homaj rajtoj. Tiu dimensio estas tro ofte preteratentata, kaj tiel la homa rajto plene kaj sendiskriminacie kompreni kaj esti komprenata je internacia nivelo ne povas realiĝi,

al Unesko ke, kadre de sia LINGUAPAX-programo, ĝi konsideru instruadon de Esperanto por eksperimenti ĝian valoron en la antaŭenigo de interkultura edukado,

al la landaj kaj fakaj organizaĵoj de la Esperanto-komunumo, ke ili intensigu en ĉi tiu spirito kaj en la kadro de Kampanjo 2000 siajn klopodojn por meti la internacian lingvon Esperanto kaj ĝiajn valorojn je la servo de la evoluo de la nuna mondo en paco kaj toleremo.

Ni eliris el la cirklo

Kiam oni rerigarde inventaras la Universalan Kongreson plej grandan de post la Jubilea Jaro kaj la dekan plej grandan kiam ajn, oni povas nur bedaŭri... ke ĝi ne povis pli longe daŭri.



Ŝanĝo de Estraro signifas ke ŝanĝiĝas la podianoj de la inaŭguro ĝis la fermo. Apud la ĉeestantaj membroj de la nova Estraro (Kep Enderby, Renato Corsetti, Michela Lipari kaj Petro Chrdle) sidis la prezidanto de la Akademio, Geraldo Mattos, IKU-rektorino Barbara Despiney, Louis C. Zaleski-Zamenhof, ĝenerala direktoro Osmo Buller, LKK-estrino Claude Nourmont kaj Jimmy Stryhn Meyer, vicprezidanto de TEJO.

Prezentinte ilin, prezidanto Enderby anoncis surprizon, plej impresan por francaj kongresanoj: antaŭ la publiko aperis unu el la plej famaj kanzonistoj de Francio, Guy Béart (vd. p. 162.)

Laŭ tradicio, ĝenerala sekretario Michela Lipari statistikis ciferajn aspektojn de la kongreso: la 3133 aliĝintoj el 66 landoj povis partopreni i.a. 19 artajn aranĝojn kaj 28 prelegojn. Same kiel pasintjare, meza kongresano aliĝis al pli ol unu ekskurso: 3550 ekskurs-lokoj estis okupitaj.



Kelkaj florbukedoj al la LKK-anoj estis nur simbola rekompenco nome de trimil-kapa kongresanaro.

La urbo vidis nin

Kvankam la urbestron mem (en la urbodoma akcepto) ni ne vidis, daŭrigis Lipari, la urbanoj ja abunde vidis nin. Tio dankeblas ne nur al la relativa malgrandeco de Montpeliero (300 mil loĝantoj), sed precipe al elstara agemo de la organizantoj, kiuj zorgis ekz. elmetadi allogajn kaj informhavaĵajn afiŝojn ĉie en la urbo. Tiel ni “eliris el nia *cirko*... pardonu, *cirklo*!” — korektis sin la UEA-sekretario.

Osmo Buller anoncis la rezultojn de Belartaj Konkursoj (aperontajn en nia oktobra numero). Barbara Despiney

raportis pri la ok prelegoj de IKU kaj la kunlaboro kun AIS.

La rezultojn de la kolokvo pri lingvopolitiko kaj interkultura eduko resumis Renato Corsetti. Ekstermovadaj fakuloj kaj politikisto venis al aranĝo realigita sub aŭspicioj kaj kunlabore kun Unesko, kiu markas ekan fazon de propedeŭtika projekto de ILEI kaj UEA. Rilate la kongrestemon, kiun li

reĝisoris, li konkludis ke eĉ eksolvi la ĉe-mediteraneajn problemojn ja superas niajn fortojn; la ĉefa tasko de nia movado estu plinombrigi e-istojn sur la sudaj bordoj de Mediteraneo.

La kongresa rezolucio, rilata al la lingva dimensio de homaj rajtoj (vd. p. 151), estis aklame aprobita.

Post raporto de Chrdle pri la Strategia Forumo (vd. p. 150), Lipari memorigis ke la UK havis ankaŭ etulan paralelon en la formo de Internacia Infana Kongreseto, kie infanoj el 20 landoj praktikis la lingvon plej nature, dum ludado.



Premioj: Azio kaj Afriko

Post Chopin-valsoj ludataj de Aldo Fiorentin, Buller anoncis la aljuĝon de Subvencio Cigno kaj Premio Deguchi. La unua, kiu apogas agadojn en la tria mondo kaj Orienta Eŭropo ĉiujare per 500 mil enoj (7354 gld.), estis aljuĝita al Vjetnama E-Asocio, por helpi la eldonon de *Plena Vortaro* de Nguyễn Minh Kính (Honora Membro) kaj por aranĝi Duan Azian Kongreson en aŭgusto 1998. Premio Deguchi, kies 4000 gld. (zorge de la japana religia movado Oomoto) rekompencas "kontribuon al plifirmigo de internacia amikeco", apenaŭ povus trovi pli meritan laŭreaton ol Helga Farukuoye el Aŭstrio, kiu jam de jardekoj helpas korespondante, instruante kaj organizante la movadon en Niĝerio. En siaj dankvortoj Farukuoye emfazis ke ŝi ricevas por sia agado mono- kaj librodonacojn, precipe de Domenico Trombetta kaj de Herbert Mayer.

Louis C. Zaleski-Zamenhof ankorau dubis ĉu maro povas servi kiel ponto (vd. p. 150), sed klarigis sian unikan plezuron kongresan: en UK li povas aperi kiel *nepo*, dum ekster Esperantujo li de longe rolas avon...

De Havano al Montpeliero

Post la salutvortoj de Mattos kaj Stryhn Meyer, la nova UEA-prezidanto Kep Enderby rakontis en multflanka parolado ke en sia unua UK (Havano, 1990) li estis nur timema komencanto... Li vicigis meritajn dankojn: al la Elekta Komisiono (William R. Harmon, Renato Corsetti kaj Tatuo Huzimoto) pro ties "apenaŭ konsciebla kvanto da laboro"; al la antaŭa Estraro, precipe LEE Chong-Yeong, kies iniciatoj difinas multajn sekvindajn vojojn por la nuna, kaj al LKK, kiu laboris brile kaj sukcesis trovi grandan helpon de lokaj aŭtoritatoj kaj unuopuloj.

Kompreneble, LKK ricevis ankaŭ la tradician floro-dankon. Ĝia gvidantino, Claude Nourmont, transdonis la kongresan flagon al sia sekvonto por la Berlina UK, d-ro Bengt-Arne Wickström, kiu nun alfrontas la defion okazigi Universalan Kongreson eventuale eĉ pli grandan ol la Montpeliera. Almenaŭ pri la komenca kaj fina programoj d-ro Wickström ne bezonas pripensi: ili estos, same kiel en 1998, komuna kantado de nia himno, "La espero".

István Ertl

KULTURO

Auld baldaŭ kandidato por Nobel-premio

Ekde la 21-a de aŭgusto la gazetoj *The Times*, *Daily Telegraph*, *Le Monde* kaj multaj aliaj ehis nekutiman informon: Esperantlingva verkisto estas kandidato por la literatura Nobel-premio.

Fakte, laŭ iniciato de la verkisto Manuel de Seabra, William Auld estas antaŭ februaro 1999 kandidatigota fare de Esperantlingva Verkista Asocio (EVA), Esperanta PEN-Centro kaj Internacia Esperanto-Muzeo Vieno por la Nobel-premio pri literaturo en 1999. La vortumon de la kandidatiga letero la komitato de EVA aprobis en Montpeliero.

La "komunikila lavango" — kiel rakontis al ni Auld — ne estas tamen merito de EVA aŭ PEN, sed de amiko lia, Norman Roberts, kiu ekrulis la inform-pilkon tradukante artikolon de *Heroldo* pri Auld por loka ĵurnalo, *Alloa Advertiser*. Ĉi tiu aperigis intervuon kun Auld (20 aŭg.), rimarkitan sammatene de skota novaĵ-agentejo, kiu mem telefonis por intervjuo kaj sciigis ĉiujn ĉefajn ĵurna-

lojn skotajn kaj britajn. Ekatentis pri la novaĵo kvin programoj de la radio BBC, gazetoj en Britio kaj — post apero de la informo en *The Times* —

ankaŭ eksterlande... La pilko plu ruliĝas.

"Leginte pri mia kandidatigo por la Nobel-premio", komentis por ni William Auld, "mi sentas antaŭ ĉio grandan honorigon pro tiu ĉi elstara komplimento fare de miaj samideanoj kaj kolegoj en Esperanta PEN-Centro, EVA, IEMW, kaj ĉiuj kiuj kunlaboris por tion re-

aligi. Aparte mi brakumas Manuelon de Seabra, la genian elpensinton de la ideo. La kunmetado de la nomoj Nobel kaj Esperanto devigas respekton por nia lingvo kaj ĝia literaturo, kiu jam rikoltis vastan rekonon en la gazetaro kaj la radio, ne nur en mia lando."

La sekvan fojon Auld aperos publike kiel speciala gasto de la skota nacia poezi-festivalo: la 9-an de oktobro li prelegos en St. Andrews pri "Skota poeto en Esperanto". ★



William Auld


KONKURSO PRI SATIROJ

Se vi aĝas malpli ol 30 jarojn kaj ŝatas gajni, verku ironian rakonton pri temo libere elektita — sed interesa por la junularo aŭ socie aktuala —, eventuale kun rilato al Esperanto kaj ĝia movado, kaj partoprenu per via originale Esperantlingva teksto en la konkurso de TEJO pri satiroj. Via verko devas ampleksi inter 4 kaj 8 paĝojn A4. La unua, dua kaj tria premiitoj ĉiu ricevos *Plena Ilustrita Vortaro* kaj la diskon *Vinilkosmo-kompil'* (1 aŭ 2), la unua kaj la dua krome 300 resp. 150 germanajn markojn, plus la ĉampiono estos abonigita al *Rok-gazet'*. Pluaj diskoj kaj kasedoj por la 4-a-7-a lokitoj!

Enfermu vian verkon en koverton, metu ĉi tiun — kune kun papero malkaŝanta vian identecon — en alian koverton kaj sendu ĉion, antaŭ la 30-a de oktobro, al TEJO (ĉe la CO de UEA, adreso en la kolofono). Indiku sur la koverto "Por la Satiro-konkurso".

Aĝo: Jen la averaĝo

Statistiko pri la 2645 kongresanoj kun konata naskiĝjaro (do, 84% de la aliĝintoj) montras ke la meza aĝo de kongresano estis 51 jaroj. 582 partoprenintoj aĝas inter 3 kaj 35



Aĝ-distribuo de la UK-anoj

jaroj (22%); sekvas la kategorio de mezaĝuloj (36-50 jaroj: 556, 21%), de homoj proksimaj al pensiigo (51-65 jaroj: 797, 30%), kaj fermas la vicon 710 kongresanoj super la aĝo de 65 jaroj (27%). La kongresa aĝ-distribuo tamen certe ne spegulas tiun de la tuta e-istaro, se konsideri ke multaj gejunuloj kaj mezaĝuloj ne povas kongresi pro manko mona aŭ tempa.

Aŭkcio: Milfranka glaciaĵo

Sub la energia gvido de Osmo Buller kaj Diccon Masterman, vendiĝis libroj, revuoj, muziknotoj, buŝtuko, fotoj, insignoj... eĉ glaciaĵo konsumota en akompano de Louis C. Zaleski-Zamenhof (ĉi lasta kontraŭ mil frankoj). Rekordan vendoprezon (po 2100 frankoj) atingis la Bulonja kongreslibro kaj albumo de la Krakova UK (1912). La poemo *La tagiĝo*, en originala manskribo de Grabowski, valoris 1500 frankojn. La entuta vendosumo, 13 042 frankoj (4378,53 gld.) enkasiĝis al la Volontula Fondaĵo de UEA.

Béart: La espero de frateco

Salutinte en Esperanto la publikon de la solena fermo, la franca kanzonisto Guy Béart bedaŭris ke li ne povas daŭrigi “en nia bela lingvo”, kvankam li lernis ĝin kiel kvarjara infano, de sia patro “pasint-jarcente idealisma”. En la adoleska aĝo li tamen pli interesiĝis pri “la lingvoj kiujn parolis belaj hispaninoj kaj angliinoj”... Béart konscias ke E-o estas “lingvo de frateco kaj amikeco”, ne de ekonomio. Per la aliĝo de tiom da parolantoj al la Montpeliera “mondĉampionado de Esperanto” li fakte vidis sian esperon de frateco plenumita.

Guy Béart aperis ankaŭ en la postkongresa aranĝo de la jubileanta Unuiĝo Franca por Esperanto, kie liaj kanzonoj estis

Guy Béart



interpretataj — jen duete jen solkante — de Ĵak Le Puil kaj de li mem.

Infanoj:

Bone garditaj

En la kongresejo funkciis dumtaga gardejo por infanoj. Laŭ raporto de prizorgintino Catherine Giangrossi, la gepatroj estis kontentaj pri la ejo, kiu fariĝis renkontopunkto ankaŭ por ili. Entute dum la semajno 33 infanoj el 9 landoj estis akceptitaj, de 4-monata ĝis 12-jara aĝo. La zorgantoj parolis



KONGRESO KERN

Cseh-aranĝoj: Amasa intereso

Malgraŭ ke la Cseh-kurso estis aparte agenda, ne malpli ol 49 personoj el 6 landoj partoprenis ĝin, de 7-jara ĝis 80-jara aĝo. La Cseh-seminario, pri instrumentodiko, estis frekventita de 23 kongresanoj el 13 landoj, el kiuj 17 ricevis ateston post plenumo de provleciono. La kurson kaj seminarion gvidis d-rino Katalin Smidélus.

La ekzamenon por fariĝi Cseh-instruisto faris 5 kandidatoj el 4 landoj: sukcesis 3, Lício de Almeida Castro (Brazilo), Monique Noël (Francio) kaj Sabine Trenner (Germanio). Per tio la nombro de diplomitaj Cseh-instruistoj kreskis al 32. Aktuala listo haveblas ĉe Internacia Esperanto-Instituto (Riouwstr. 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando).



D-rino Katalin Smidélus

FAME: Nova premio

La nova scienca premio de FAME-Fondaĵo (3000 germanaj markoj) estis transdonita de FAME-prezidanto Stefan Maul en la inaŭguro de IKU. Transprenis ĝin Manfred Westermayer, nome de E-Societo Ĉikago kaj la sciencista grupo kiu ellaboris la verkon *Generala, organika kaj biologia kemio*.

Filmo: Kameraoj krozis

Pluraj filmistaj skipoj aktivis tra la kongresejo: kaj franca kaj nederlanda teamoj preparas longdaŭran dokumentaĵon pri esperantistoj.

Akademio: La videbla duono

Verŝajne rekordo: por sia publika kunsido, 21 anoj de la

entute 43-membra Akademio de Esperanto — inkluzive la kompletan novan Estraron (vd. jul.-aŭg., p. 141) — surpodiis en su-

foka salono, fronte al granda, demandema publiko. Reaperis kelkaj jam “klasikaj” temoj (por aŭ kontraŭ neologismoj, por aŭ

kontraŭ senĉapeligado de literoj en interreto), kaj pluraj demandoj sentigis ian atendon de konkretaĵoj vaste utilaj, kiel ekz. “fajro-





al la infanoj en Esperanto (eĉ al francidoj), kiuj respondis ĉiu en sia propra lingvo. Ĉiukaze, ili ludis kune sen lingvaj problemoj.

KONGRESA MESO

Ĵurnalismo: Seminario kiu reokazu

Tre aktiva diskuto kaj valoraj kontribuoj de plena kvindeko da partoprenantoj karakterizis la seminarion de Tutmonda E-ista Ĵurnalista Asocio pri kontaktoj kun amas-informiloj. La kvarhoran seminarion prizorgis Stefan Maul. Priskribinte la problemojn renkontatajn en kontaktoj kun ĵurnalistoj — ofte pli antaŭjuĝemaj kaj rifuzemaj ol ne-informitaj ordinarioj —, li detale konsilis pri agado sur la niveloj loka, regiona, tutlanda kaj internacia. En la sekva, mirige vigla diskutado

brigada” servo, kies respondoj rapide forigus la lingvajn dubojn de redaktoroj kaj de aliaj lingvouzantoj.



Koko kriis jam

Malofte kongresa kuriero regas siajn legantojn per eksterplana kromnumero en la lasta tago: eĉ tio prosperis al *Koko*, kies nomo, ja mallongigo de “kongresa kuriero”, samtempe simbolas Francion. La paperkon bredis redaktoro Rikardo Cash kun helpo de Raymonde Pérault kaj aliaj; nutris ĝin la kongresanoj, ŝajne per pli da antaŭaj anoncoj ol per postaj raportoj pri la kongreseroj.

Samseksamo: Nova nomo

La ĝenerala kunsido de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj akceptis la demision de sekretario Petro Danning, la fondinto de LSG, kiun oni dankis pro lia enorma laboro kunligi kaj solidarigi izolitajn geajn esperantistojn. Elektigis nova sekretario kaj novaj komitatanoj (i.a. la dana eldonisto Torben Kehlet). Prezidanto restas John Wells. La nomo de la ligo ŝanĝiĝos al Gej-Lesba E-Asocio (GLEA). (A. Victor)

kaj spert-interŝanĝo unu el la centraj problemoj estis la neniigam evitebla demando: kiom da homoj parolas Esperanton? Se juĝi laŭ la kvanto kaj aktiveco de la seminarianoj, indus regule aranĝi tiajn trejn-kunvenojn. (Laŭ Stefan Maul; pli kompleta teksto aperos en Internacia Ĵurnalisto.)

Literaturo: Vino kaj gitaro

En angulo de la Libroservo eblis intima renkonto duonhora kun aŭtoroj kaj tradukistoj, kiuj prezentis kaj laŭpete subskribis siajn verkojn. Laŭviciis tie Marjorie Boulton; Mikaelo Bronŝtejn (*Legendoj pri SEJM, Oni ne pafas en Jamburg*), kun sia nemalhavbla gitaro; Karel Kraft (vortaroj ĉeĥa-Esperanta kaj Esperanta-ĉeĥa), la mondvojaĝantoj Bruno kaj Maryvonne Robineau (*Ili vivis sur la Tero*);



Vojaĝo: Obstinaĵ baroj

Bedaŭrinde, ĉiujare okazas ke pro burokrataj obstakloj iuj kongresanoj restas forbaritaj de la sopirata mond-evento. Gradimir Kragić, Aleksandar Šajinović kaj Igor Milovanović el Teslić (Serba Respubliko de Bosnio kaj Hercegovino) povis saluti la kongreson nur per ret-poŝto, ĉar, malgraŭ validaj pasporto kaj vizoj, ili estis resenditaj jam de la landlimo de Hungario.

Aŭtobuso kun 47 rusaj esperantistoj devis atendi plurajn tagojn ĉe la ĉeĥa-aŭstra limo por daŭrigi la veturon la 1-an de aŭg. (en la unua tago de la UK), kiam ekvalidis iliaj vizoj por la t.n. “Schengen-landaro”.



Komplezo de Hugo Rollinger



Barbara Pietrzak

Radio: Varsovio sen devio

Dank’ al Barbara Pietrzak, Pola Radio povis prezenti ĉiutage inter 10 kaj 20 minutojn da son-raportoj kaj intervjuoj por siaj aŭskultantoj en Eŭropo.

ZEO: Jen la 1100-a

Semajnon antaŭ la UK, la 1100-a Zamenhof/Esperanto-Objekto (ZEO) estis inaŭgurita en Veisiejai (Litovio). En tiu urbeto d-ro Zamenhof loĝis kvar monatojn en la jaro 1885, kaj tie li finpretigis sian lingvon. En Veisiejai jam antaŭe troviĝis du ZEO-j: memorŝtono pri la iama loĝejo de Zamenhof kaj Zamenhof-strato. La 22-an de julio, kadre de la 34-aj Baltiaj E-Tagoj, estis inaŭgurita tria ZEO, Zamenhof-monumento. En la solenaĵo parolis d-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof. La litova prezidento, Valdas Adamkus, sendis salutmesaĝon.

Jean-Luc Tortel (trad. de *La besto de Vakareso*), kaj Miguel Faria de Bastos (surbilde), kiu

kunportis el sia portugala hejmlando plurajn botelojn da Portovino por tosti la aperon de sia dokumenta volumo *Timor — La plej granda ekstermejo en la mondo*, kies antaŭparolon verkis Nobel-pacpremiito José Ramos Horta.

Rezignante paroli pri propraj poemoj, Miguel Fernández rekomendis sian ĉinan poeto-fraton MAO Zifu, kiu bezonas monhelpon por eldonigi sian poemaron *Kantoj de Anteo*, laŭ Fernández epokofaran. La unua tiucela donaco jam venis al la UEA-konto “maoz-o”.

Nekrologoj

Ivan ANDREJEVIĆ (1913-1998), kunfondinto kaj plurajn jarojn sekretario (1954-) de Vojvodina E-Ligo, redaktoro de ties bulteno, mortis la 10-an de majo en Novi Sad (Jugoslavio). Li instruis diversnivele, verkis kaj tradukis instru- kaj inform-materialojn.

Santiago BARRERAS LINARES, delegito de Universala Medicina E-Asocio en Kubo, forpasis la 11-an de majo. Li ofte gvidis renkontiĝojn de medicinistoj, i.a. Seminariojn pri Apliko de E-o en Scienco kaj Tekniko (SAEST).

José BASTOS CAMPOS (1933-1998), delegito pri turisma informado en Fortaleza (Brazilo), forpasis en majo.

Giordano FALZONI (1925-1998), fondinto de "Esperanto" Radikala Aso-

cio, pentristo, skulptisto, verkisto, kiu aktoris en kelkaj Fellini-filmoj, mortis en Milano (Italio) la 26-an de aprilo.

Nikolai LOZGAČEV (1957-1998), rusa poeto, tradukanto, kanzonisto, forpasis la 4-an de aŭgusto post unusemajna komato, kaŭzita de riverakcidento. Aktiva e-isto ekde 1981, li tradukis kantojn de Vysockij jam en 1983 (eldono: *La birdo Gamajun*, 1989). Li prezidis la E-rondon Kulturo, formiĝintan ĉirkaŭ la samizdata kultura almanako *Sezonoj* (1984-91), por kiu li artikolis pri kaj tradukis el la rusa poezio, redaktante ĝin ekde 1990. La originalaj poemoj de Lozgačev aperis en *La tago del eterno* (1987)



Nikolai Lozgačev

Memorportreto (el La tago del eterno)

kaj en la kolektiva volumo *Kvarteto* (1996). Li regule kontribuis al E-periodaĵoj, precipe al *Literatura Foiro* kaj al *La Ondo de Esperanto*, kies grafikan koncepton li aŭtoris. Li muzikigis kaj barde kantis poemojn siajn kaj de aliaj E-aŭtoroj. Kiam post la falo de Sovetunio fondiĝis Ruslanda E-Asocio (REA), Lozgačev agadis kiel ĝia unua prezidanto ĝis la unuiĝo de Rusia E-ista Unio kaj REA en 1994, kiun unuiĝon li mem proponis. En 1999 ĉe Sezonoj aperos en lia traduko du el la *Malgrandaj tragedioj* de Puŝkin.

Maurice PROVOST (1924-1998), dumviva membro, forpasis la 24-an de aprilo en Montrealo (Kanado).

SUGAWARA Keiiti (1911-1998), e-isto ekde 1928, membro de Japania E-Instituto de 1929, delegito en Natori pli ol 30 jarojn, mortis lastatempe.

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Svislando: M. Meyer. Usono: T.A. Phoenix.

PATRONOJ DE TEJO 1998

Belgio: Antoine J. Mechelynck. Britio: Eric W. McCanlis. Germanio: d-ro Rokuro Makabe. Nederlando: E.C. Klaver. Usono: Sidney S. Culbert.

SOCIETO ZAMENHOF 1998

Brazilo: Gilbert René Ledon; Symilde Schenk Ledon. Britio: Eric W. McCanlis. Francio: Auguste Huberdeau; Yvette Vienne. Germanio: Werner Heinrich. Nederlando: Dini Kappert; Jan Otto de Kat. Rusio: Tatjana Rudakova. Svedio: Boo Mee Kim-Lindblom; K.G. Lennart Lagerkrantz.

DONACIOJ 1998 (NLG)

ĝis la 31-a de aŭgusto

Asocia Kapitalo: Nederlando: legaco P.B. Grolleman-Hobe 3000,00. Nov-Zelando: heredajo R. Harding 21 042,54. Sumo ĉi-jara: 72 531,20.

Fondaĵo Afriko: Francio: kolekto en UK-budo 757,54. Nederlando: S. Kanter 200,00. Pollando:

B. Chodera 20,00. Svedio: J. Hammarberg 37,93. Sumo ĉi-jara: 15 390,67.

Fondaĵo Ameriko: Francio: Kolekto en UK-budo 288,11. Kanado: J.E. Smythe 61,74. Usono: ELNA 604,50. Sumo ĉi-jara: 4646,41.

Fondaĵo Azio: Japanio: M. Esaki 57,26; K. Hayasi 29,34; Kameoka Esperanto-Kai 114,52; M. Kinoshita 29,60; Y. Mine 29,34; Y. Mizuno 513,97; T. Nagano 28,63; I. Nakamura 88,79; Y. Ootuka 29,34; A. Saiki 29,60; K. Sanpei 29,60; W. Schmid 73,36; A. Seko 28,63; T. Somekawa 58,68; A. Stefas 28,63; T. Tadaisi 29,34; M. Tamura 28,63; Y. Tanaka 71,58; H. Tani 29,34; H. Todoroki 29,34; T. Uehara 57,26; Y. Yamasaki 29,34. Sumo ĉi-jara: 5577,73.

Fondaĵo Canuto: Finnlando: V. Tikkanen 21,00. Germanio: L. Mahn 10,00. Japanio: A. Morita 100,00. Kanado: S.T. Norvell 50,00. Nederlando: R. Moerbeek 25,00; P. Schuil 15,00. Slovenio: J. Židanik 506,80. Sumo ĉi-jara: 8571,91.

Konto Espero: Germanio: A. Hanke 10,00. Sumo ĉi-jara: 572,48.

Junulara Fondaĵo: Germanio: W. Heinrich 225,05. Kanado: N. Fleury 34,70. Sumo ĉi-jara: 2369,53.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Germanio: E. Blasius 50,00; L. Mahn 10,00; R. Makabe 100,00; F. Reisel 140,00. Japanio: A. Morita 100,00. Kanado: S.T. Norvell 50,00. Nederlando: R. Moerbeek 25,00. Sumo ĉi-jara: 1278,76.

Volontula Fondaĵo: Germanio: E. Blasius 50,00; L. Mahn 10,00. Japanio: A. Morita 100,00. Nederlando: R. Moerbeek 25,00. Sumo ĉi-jara: 1997,55.

Kampanjo 2000: Japanio: Ŝimeko Miyoshi 20 200,50. Nederlando: G.A.M. van Bergeijk 100,00. Norvegio: A.O. Mjølne 80,10; O. Bjørnsrud 178,00. Sumo ĉi-jara: 46 269,25.

Ĝenerala Kaso: Belgio: A. Riem 54,43. Italio: R. Sommi 25,18. Nederlando: G.F. Makkink 3000,00; M. Meijwes (por Societo Zamenhof) 500,00; F.D. v. Zoest 50,00. Sumo ĉi-jara: 7658,20.

Estraro de UEA

Prezidanto (eksteraj rilatoj, kunordigo): S-ro Kep Enderby, 2 Phoebe Street, Balmain, Sydney 2041 NSW, Aŭstralio; ☎+61-2-9810-4227; ✉+61-2-9555-9705.

Vicprezidanto (Kampanjo 2000, landa agado, financoj): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto,

IT-00036 Palestrina, Italio; ☎/✉+39-6-957-57-13; ✉corsetti@itelcad.it.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎+39-6-39-72-61-98; ✉+39-6-39-72-61-69; ✉lipari@esperanto.nu.

Estrarano (faka kaj scienca agado, edukado): d-ro Petro Chrdle, Anglická 878, CZ-252 29 Dobřichovice,

Ĉeĥio; ☎+420-2-991-2201; ✉+420-2-991-2126; ✉chrdle@telecom.cz.

Estrarano (agado en Afriko): s-ro Gbeglo Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando.

Estrarano (informado): s-ro Kalle Kniivilä, S:t Hans gränd 34 B, SE-224 62 Lund, Svedio; ☎+46-70-636-93-78; ✉kallekn@esperanto.nu.

NOVAĴOJ

de la eldona fako
de UEA


TERMINOLOGIO EN PRAKTIKO

TERMINOLOGIA GVIDILO. Heidi Suonuuti. El la angla trad. Sabine Fiedler. Redaktis Wera Blanke. Rotterdam: UEA. 38+4p. ISBN 92-9017-057-3. 21 cm. Prezo: 12,00 gld.

Jen gvidlibreto por ĉiu kiu serĉas kompaktan enkondukon al la principoj kaj metodoj de praktika terminologio. Ĝi estas bazita sur la aktualaj ISO-normoj, kies esencon ĝi prezentas klare kaj koncize per facile kompreneblaj ekzemploj.

La aŭtorino havas longan sperton pri terminologia laboro kiel multjara manaĝero de Finna Centro por Terminologio kaj prezidantino de Teknika Komitato TC 37, *Terminologio (Principoj kaj kunordigo)*, de ISO, Internacia Organizo por Normigado.

La originalo estis verkita laŭ komisiono de Nordterm, asocio de terminologiaj organizaĵoj kaj societoj en Nordio. La Esperanto-eldonon preparis Terminologia Esperanto-Centro de UEA kunlabore kun la aŭtorino.



POR SUKCESI EN EKZAMENO



INTERNACIAJ EKZAMENOJ DE ILEI/UEA. Gvidilo al la elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. Dua eld. Rotterdam: UEA/ILEI, 1998. 34p. ISBN 92 9017 055 7. 21 cm. Prezo: 6,60 gld.

Internaciaj Ekzamenoj de ILEI kaj UEA mezuras la kapablon uzi Esperanton en praktiko. Centoj da esperantistoj jam ekzameniĝis kun sukceso je elementa aŭ meza nivelo. Tiu

ĉi gvidilo helpas novajn kandidatojn por prepari sin por ekzameno. La postularo kaj regularo klarigas la formalan bazon de la Internaciaj Ekzamenoj. Specimenaj testoj de la du niveloj konigas la praktikan funkciadon de la ekzamenoj.

La libreto taŭgas kaj por memstudado kaj por uzo en kursoj.

BAZOJ POR ESTONTA AGADO

ESPERANTO POST LA JARO 2000. Aleksander Korjenkov. Diskutkajeroj 1. Rotterdam: UEA, 1998. 18p. ISSN 1388-2252. 21 cm. Prezo: 4,80 gld.

Fine de la 20-a jarcento la mondo estas tute alia ol en ĝia komenco kaj la superrego de la angla ŝajnas neskuebla.

Jena eseo provas distingi bazojn por estonta agado de esperantistoj kaj por kreo de pozitiva bildo pri Esperanto kaj esperantistoj. La aŭtoro montras malfortojn de rutinaj kredoj kaj faras kritikajn notojn marĝene de Kampanjo 2000 kaj la Manifesto de Prago. *Diskutkajeroj* estas nova serio de artikoloj kaj eseoj pri aktualaj temoj, diskutindaj aŭ jam diskutataj en UEA aŭ la Esperanto-komunumo ĝenerale.



TRIONA RABATO EKDE 3 EKZ. DE SAMA TITOLO ĈE LA LIBROSERVO DE UEA.

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefono: +31 10 436 1044

Telefakso: +31 10 436 1751

Retpoŝto: <uea@inter.nl.net>

25-jara jubileo de ludovikito



En 1973 aperis la 160-paĝa volumo *Unuaj libroj por esperantistoj*. Dudek kvin jarojn poste, ni disponas pri ĉ. 25 000 paĝoj en 55 volumoj, kio senkonkurence estas la plej granda eldonprojekto iam entreprenita en la historio de la Esperanto-movado. Ĝi estas ankaŭ la plej luksa librokolekto pri kiu ni disponas. Kaj ĉio tio estas laboro de unu homo — ludovikito (Itô Kanzi), kiu meze de januaro festis sian 80-an datrevenon en Kioto. Jen skiza prezento de tiu monumenta zamenhofologia kolekto:

Parto unua:

Originalaro: Aperis 16 volumoj kun preskaŭ 5800 paĝoj.

Parto dua:

Tradukaro: Aperis 7 volumoj kun 4200 paĝoj.

Parto tria:

Kromkajeroj: Aperis 10 volumoj kun preskaŭ 3000 paĝoj.

Ludovikologia dokumentaro:

Aperis 19 volumoj kun pli ol 9200 paĝoj.

Konciza originalaro:

Aperis 3 volumoj kun pli ol 2900 paĝoj:

unua etapo de esperanto

1878-1895, 948p.

ĝis la homaranismo

1896-1906, 945p.

destino de ludovika dinastio

1907-1917, 988p.

ermitoj kuncelebris la majstron

kromkajero, 321p.

Petu kompletan liston ĉe la Libroservo de UEA. Mendu ĉe la libroservoj de UEA, JEI kaj KLEG. Por mendoj de pli ol 10 ekzempleroj de la sama volumo skribu al: Libroteko Tokio, 7-15, Nisinipori 3, Arakawa-ku, Tokio, 116-0013 Japanio; <syozik@qa2.so-net.or.jp>.



eldonejo ludovikito

VASTAS LA MONDO, MULTAS LABORO

Kim Woo-Choong

Fondinto kaj prezidanto de Daewoo




Libro kiu "inspiras al junuloj revon kaj esperon" kaj helpas kompreni la mensan fonon de la ekonomia sukceso de la "aziaj tigroj".

La aŭtoro estas fondinto de la Daewoo-grupo, unu el la plej grandaj entreprenoj en la mondo. Daewoo subvencias la Esperanto-eldonon, kiu estas vendata favore al Kampanjo 2000.

Vastas la mondo, multas laboro. Kim Woo-Choong. Trad. Choe Taesok. Seulo: Shin Cheon Ji, 1998. 219p. ISBN 89 85005 16 2. Prezo: 18,00 gld.

POR LERNI KAJ ARGUMENTI

Ĉu la lingvopolitiko de internaciaj organizaĵoj utilas nur por simbolaj politikaj celoj? Ĉu aktualaj modeloj de plurlingva demokratio efektive diskriminacias? Kian rolon ludu lokaj lingvoj en la solvado de mondaj problemoj? Kion eblas lerni el la spertoj pri Esperanto? Ĉiu kontribuado en la originala lingvo (angla, franca aŭ Esperanto), kun resumo en ĉiuj tri lingvoj. La angla teksto de la pionira raporto "Esperanto kaj la lingva demando ĉe Ligo de Nacioj" de NITobe Inazō estas unuafoje publikigita ĉi-libre.



AL LINGVA DEMOKRATIO / TOWARDS LINGUISTIC DEMOCRACY / VERS LA DÉMOCRATIE LINGUISTIQUE. Aktoj de la Nitobe-Simpozio, Prago, 1996. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc (red.). Rotterdam: UEA, 1998. 212p. ISBN 92 9017 054 9. 24cm. Prezo: 22,50 gld.

Rikolto de 50 jaroj

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindek de miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. — Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum mia vivo mi verkis verŝajne centojn da librorcenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofundigis en la koncerna afero, kaj la rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literaturesplora laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)



La libro estas aranĝita en kvar sekcioj:
Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo.
Tre bela grafika prezento.

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj. William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 348p. ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: 42,00 gld.

Cent jaroj (1896-1996) da stratoj, placoj, monumentoj, bustoj, kulturcentroj, tabuloj, parkoj, pontoj, asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam: UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabuloj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo: 18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)

